

LITERATURA

Mondo

TRIA PERIODO — DUA JARO — 7—8

ĈEFREDAKTORO: KOLOMANO KALOCSAY

REDAKTA KOMITATO: FERENC SZILÁGYI, LUDOVIKO TÁRKONY, GASTON WARINGHIEN

ĈEFKUNLABORANTO: JULIO BAGHY

ĈAPITRO EL LA ROMANO DE
ISTVÁN KOSSA

DU ĈAPITROJ EL MAKARENKO
NOVELO DE R. ROSSETTI

POEMOJ DE BRENDON CLARK,
TÁRKONY, KALOCSAY, B. WILLIAM
AULD.

POEMTRADUKO EL DROSTE-
HÜLSHOFF (H. DRESEN) KAJ
FERGUSON (DINWOODIE).

PUBLIKA LETERO DE WARINGHIEN
LINGVO — OBSERVO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: BUDAPEST, VIII RÖKK SZILÁRD-STR. 28. HUNGARIO

PREZARO

Prezoj estas montritaj en USA-dolaroj

	Bind.	Broŝ.		Bind.	Broŝ.
K. Kalocsay:			Kalocsay—Baghy:		
* <i>STREĈITA KORDO</i>		1.20	<i>ARGENTA DUOPO</i> , jubilea libro, I-a volumo		1.30
Madách—K. Kalocsay:			Muzik-notoj de la II-a volumo (Kantoj de Baghy—Kalocsay)		—50
<i>TRAGEDIO DE L' HOMO</i>		1.—	A. Baur:		
K. Kalocsay—Dante:			<i>SVISA ANTOLOGIO</i>	4.60	4.—
<i>INFERO</i>	2.50	2.—	K. Kalocsay:		
K. Kalocsay:			<i>RIMPORTRETOJ</i>		—40
<i>ARTHISTORIO I.</i>		2.80	Asch—Lejzerovicz:		
K. Kalocsay—Waringhien:			<i>SORĈISTINO EL KASTILIO</i>	1.50	1.—
* <i>PARNASA GVIDLIBRO</i>		1.—	Grenkamp—Bzrekowski:		
Bleier—Kökény—Ŝirjaev:			<i>PRI L' MODERNA ARTO</i>	1.—	
* <i>ENCIKLOPEDIA DE ESP.</i>			T. Herzl—B. Selzer:		
vol. I—II. ilustrita		Elĉerpiĝis	<i>LA JUDA ŜTATO</i>		—90
Nur la II-a vol. ilustrita		5.—	Adamson:		
Sen ilustraĵoj, vol. I—II.		6.—	<i>AULI</i>		—60
L. Tárkony (Totsche):			I. Lejzerovicz:		
<i>DE PAĜO AL PAĜO</i>	1.20	—90	<i>EL LA VERDA BIBLIO</i>	—70	—40
K. Kalocsay:			Jerome—Badash:		
<i>DEKDU POETOJ</i>	1.20	—75	<i>TRI HOMOJ EN BOATO</i>	1.90	1.40
E. Aisberg:			Kikuĉi—Ŝimomura:		
<i>FINE MI KOMPRENAS LA RADION</i>		1.40	<i>AMO DE TOOJUURO</i>		—40
E. Wiesenfeld:			Goethe—Kalocsay:		
<i>VERKARO DE FEZ</i>		2.—	<i>ROMAJ ELEGIOJ</i>	—80	—60
Van Loon—Saville:			N. Kurzens:		
<i>RIGARDU LA TERON</i>		4.—	<i>MIA SPEKTRO</i>		—50
			Bleier—Ĉense:		
			<i>ORA LIBRO DE LA ESPE-RANTO-MOVADO</i>		1.—

Aldonu 10% por afranko
 Ni respondecas nur por rekomenditaj sendaĵoj.
 Rekomendo por pakaĵo —.20 USA-dolaroj.

Rimarko: La kovrilpaĝoj de la libroj markitaj per*, perdiĝis pro la militaj okazintaĵoj. Tial ili havas simplan karton-kovrilon, sen ajna surskribo.

Provnumeroj de Literatura Monda kontraŭ 2 respondkuponoj.
 Librojn mendu ĉe niaj reprezentantoj aŭ ĉe via libristo.

De Danubo ĝis Dono

István Kossa.

István Kossa, el kies travivaĵ-romano ni publikigas unu ĉapitron en L. M., estas esperantisto: antaŭ la milito li tre aktive partoprenis en la laboroj de la H. E. Soc. Lab. Li estis sekretario de la tramista sindikato, kaj kiel tian, oni metis lin dum la milito en t. n. „specialan“ laborservan kompanion, kiun pli ĝuste oni povus nomi pereiga kompanio, ĉar la instrukcio estis, ke neniu el la kompanianoj revenu viva. La „kadruĵo“, t. e. la „konfidindaj“ gardistoj de la kompanianoj ankaŭ klopodis laŭ sia eblo por tio, ke la kompanio „elĉerpiĝu“ kiel eble plej rapide, ĉar al ili oni donis la esperon, ke tiam ili povas reveni hejmen. Kossa kun kelkaj nemultaj suferantoj sukcesis resti viva: li trafis feliĉe en sovjetan kaptitecon. De tie, kiel partizano, li venis tra la fronto ree hejmen kaj en Budapeŝto li estis unu el la subteraj organizantoj de la rezisto. Post la liberiĝo li iĝis la ĉefsekretario de la sindikata konsilantaro, reprezentanta 1,500.000 da hungaraj laboristoj.

En sia verko skribita pri siaj travivaĵoj, li volis doni malpli literaturon ol fidindan dokumentaron pri tiu malhoma atmosfero, kiu regis en tiuj kompanioj. Sed lia senpasia objektiveco kaj granda sincero, lia plastika simpla donas al lia verko neordinaran valoron, kaj klarigas ankaŭ la grandan sukceson de la libro vendata en pli kaj pli da dekmiloj da ekzempleroj. La sendignigo de la homo, la inkuba sensenco de la homsuferigo, la stulta malico de la faŝismo prezentigas al ni kun konsterna forto en la epizodaj rakontitaj kun kvazaŭ stoika egalanimeco.

XI. ĉapitro.

— Homoj — tia estis la dirkutimo de oĉjo Kalla — hodiaŭ necesas du turnoj de akvobarelo, ni kuirus supon kaj pizlegomon. Ankaŭ du ŝafojn ni buĉos.

— Ni iru, homoj, por akvo, ni iru, ni iru, male ni staros tie ĉi tagmeze kiel meso sen pastro.

Mi jungis en trojkon la tri rusajn ĉevalojn, kiujn ĉefserĝento Rotyits „akiris“ ie antaŭ Stariŝkol. Multe mi devis peni pri la „komet“, kiun kun ĝia pinta fino malsupren oni devis kroĉi al la kolo de la ĉevaloj, kaj poste ĝin turni kune kun la jungaĵo. Kompreneble, pro la multa turnado, ofte interodiĝis la tuta jungilaro. Dum ni jungis, Rotyits ĉiam staris apud ni kun dismetitaj piedoj, elŝvelaj okuloj, gvatante, ĉu ni eraras pri io, por tuj nin tradraŝi per sia skurĝo

ĉiam ĉemana. Ekde Kursk, Ferko Oláh estis la kuireja koĉero. Neniam antaŭe li havis bridon en sia mano. Rotyits lin batis ĝissange preskaŭ ĉiutage.

— Kiel vi tenas tiun bridon? Bruto!

Kaj jam klakis la skurĝo sur la dorso de Oláh. Min ankoraŭ neniam li batis, nur vorte insultis. Tial laŭeble ĉiam jungis mi.

Rotyits igis jungi ankaŭ la sablokuran kaleŝon; sur tiu li akompanis nin ĝis la akvo kaj reen en la urbon. Li sidis malantaŭe en la kaleŝo kvazaŭ regiona bienulo. Fakte, li estis ordinara rabisto: ŝaf-, ĉeval- kaj bovinŝtelisto.

Antaŭe veturis Rotyits en la sablokura kaleŝo. Oláh sidis antaŭ li sur koĉerbenko. La vipo estis ĉe la ĉefserĝento. Li batis neniam la ĉevalojn, sed ĉiam la koĉeron.

Mi veturigis la trojkon kun la akvobarelo. Ankaŭ Csikvári kunestis. Onódi dorskurbis sur la barelo.

Urborande, kontraŭ la granda fabriko, en kies korto troviĝas la puto, estis granda kavoj. Cirkaŭ la kavoj, kun pafopreta armilo, dense staris germanaj gardistoj. El la kavoj aŭdiĝis seninterrompa pafado. Unuopaj pafoj, triopaj, kvinopaj serioj el maŝinpistolo. Malantaŭ la gardistoj, granda amaso rigardadis, kio okazas malsupre en la kavoj. Germanoj, hungaroj interpuŝiĝis, leviĝis sur piedpintojn, por pli bone vidi! Post pafoj aŭ pafserio — granda ridaĉo. La dorson oni batis unu al la alia pro la plezuro.

Kio povas okazi tie?

Ni venas en la fabrikkorton, kie centoj tumultas ĉirkaŭ la puto. En trinkilon, tasegon, sitelon ili pumpas la akvon, kaj ĝin sorbas avida. Ĉiu sin puŝas tumulte. Ŝoforoj volus porti akvon al la aŭto staranta antaŭ la fabriko; ili devas rapidi: la aŭto baras la vojon. Koĉeroj volus trinkiĝi siajn ĉevalojn. La oficirservistoj estas la plej impertinentaj, al ili estas plej urĝe. Atendas la sinjoro vic-kolonelo, kapitano, ĉefleŭtenanto.

— Lasu min, ĉar ve al vi, se li venos ĉi tien!

Ni, laborservuloj, ne povas eĉ ekvorti. Por akiri akvon, dum duonhoron ni tiradas la bra-

kon de la pumpila puto. Intertempe ni alŝtelas ankaŭ nian sitelon. Malfacile pleniĝas la barelo tiamaniere.

La granda magazeno de la fabriko, kies pordo estas nur kelkajn paŝojn for de la puto, nun estas kaptit-kolektejo. Ĝi estas plenŝtopita per rusaj soldatoj. Tri hungaraj infanterianoj staras ĉe la pordo kun surmetitaj bajonetoj, malantaŭ ili — centoj da kaptitoj. Tiuj ĉi centoj nun rigardegas eksteren. Miloj da okuloj gluiĝas al unu sama loko: al la puto.

Mi staras kun la dorso al la magazeno, tamen mi sentas, ke min bruligas tiuj okuloj fajraj de febro. Ni jam havas du sitelojn da akvo. Mi volas ĝin verŝi en la barelon.

El la magazeno, gardisto akompanas al la puto dekon da kapitoj. Ili ĉiuj estas vunditoj. Tra ilia malpura bandaĝo traas la puso. De malproksime ili fetoras. Eksonas hurlaĉo:

— Lasi ilin tien ĉi? Kion ankoraŭ?

Malicvizaĝa kaporalo jam triafoje plenigas sian tasegon. Duafoje li eltrinkis ĝin ĝisfunde. Nun li trinkas jam nur kelkajn glutojn, la ceteron li verŝas en la vizaĝon de la vunditoj. Tiuj prenas tion plie ŝerco ol insulto. Ili staras tie, kvin metrojn for de la savanta akvo. Tamen, al ili eĉ guteto ne doniĝas.

Ĉirkaŭ la puto estas granda flako, kiu pli kaj pli kreskas, jam komencas flueti. Tien, en la direkto de la kaptitoj. Ili ĝin rimarkas. Ili kliniĝas. Plie molan ŝlimon ili kaptas en la manplaton, ol akvon. Tiun ili prenas en la buŝon, kaj ĝin turnadas sur la lango kvaŝaŭ pecon de glacio. Poste ili elkraĉadas la koton.

Onódi paŝas flanken de la puto. Nun tiu iu alia. Ree ni havas du sitelojn da akvo. Sed tiu ne venos en la barelon. Oĉjo Onódi portas unun el ili al la vunditoj. Tiuj ĉerpas el ĝi per malpuraj metalskatoloj, fumaj tasegoj. Ili nun ne ĝemas, sovaĝe verŝas la akvon en sin. La gardisto jam repelas ilin. Venas nova grupo; al tiu donas mi la alian sitelon.

Ĉi tiuj ne tumultas. Unu el ili havas tolerable puran trinkilsubon; li ĉerpas por ĉiu akvon po du trinkilsuboj. Ankaŭ li mem trinkas. Dum la ĉerpado li alrigardas; niaj okuloj interrenkontas.

Ni komprenis unu la alian. Ili ne dankis

por la akvo, sed en iliaj okuloj estis danko.

Jam estas ĉirkaŭ tagmezo, kaj la barelo eĉ duone ne estas plena. Kion fari? Oni nin flankenpuŝas. Kaj kadrulo ne estas kun ni. Ankaŭ Csikvári iris en la urbon kun Rotyits. Ni ne povas reiri kun duonplena barelo. Nek sen akompana kadrulo.

— Al kiu apartenas ĉi tiu barela veturilo? — demandas subite ĉefleŭtenanto.

Santempe mi kaj Onódi alsaltis.

— Humile ni raportas, al ni, sinjoro ĉefleŭtenanto.

— Al kia багаĝo vi apartenas?

— Al la speciala punkompanio Nro 401.

— Ha, al tiu? Nu, malsupren do la barelon!

— Humile mi raportas, ĝi estas duone plena de akvo. Ni, duope, ne povas ĝin demeti.

— Kiu diris, ke vi ĝin demetu kune kun la akvo. Ellasu la akvon! Kial akvo por judoj?

— Humile mi raportas, ni ne estas judoj.

— Ne? Kio do?

— Kristanoj?

— Kiiio? Kristanoj? En speciala kompanio ne estas kristanoj. Nur judoj, rabistoj, murdistoj. Nu, kaj komunistoj. Ĉu vi estas rabistoj aŭ komunistoj?

— Humile mi raportas, ni estas sindikatanoj.

Jam la tuta korto amasiĝis ĉirkaŭ ni. Oni atendis je la frandaĵo, t. e. je la akvo.

Onódi kaj mi defendis la akvon. Temis pri la tagmanĝo, pri la unua post longaj tagoj tagmanĝo de la kompanio.

— Mi scias, mi scias. Sindikato. Ankaŭ tiuj estas komunistoj — diris la oficiro al kaporalo staranta post li.

— Nu, fermu la faŭkon. Malsupren la barelon!

Kvinope oni saltis al la krano, kaj ellasis la akvon. Nian pene kolektitan akvon. Ili manĝegis, sorbegis nian akvon. La vivon de la speciala kompanio Nro 401.

La oficiro foriris, postlasante la kaporalon. Kiam oni jam eltrinkis la lastan guton el nia barelo, la kaporalo nin admonis:

— Nu, nun jam ne multe flankumu, sed malsupren la barelon. Ne deziru, ke la sinjoro ĉefleŭtenanto revenu.

— Sinjoro kaporalo, humile, kio okazos, se revenos la sinjoro ĉefserĝento. Li nin mortbatos, se ni ne estos tie ĉi, se ni ne havos sufiĉe da akvo.

— Tion ni aranĝos. Nun starigu antaŭ la pordo de la magazeno.

Ree mi veturigis. Mi haltis antaŭ la gardistoj. El la veturilo, super la kapoj, oni povis vidi malproksimen en la grandegan barakon. Miloj estis tie. Tiom ili estis, ke ili povis nur stari.

Nun la kaporalo diris ion al la gardistoj. Estiĝis granda moviĝado.

Senpovajn vunditojn portis iliaj kunuloj al nia veturilo. Sesope-okope unun. Ankaŭ la sanuloj estis en terura stato. La vunditoj estis frostotremigaj. Senmanaj, senpiedaj, kun provizora bandaĝo, el kiu fluetis sango

kune kun puso. Senkovraj vizaĝvundoj. La fetoro de la putrantaj korpoj estis pli terura ol ĉia fetoro, kiun mi iam spertis en mia vivo.

Ni metis la vunditojn sur la veturilon. Mi pensis: certe oni ekspedos ilin en hospitalon. Mi jam komencis pardoni la ĉefleŭtenanton pro nia akvo.

Sur la mallonga veturilo jam kuŝas dek vunditoj. Kio okazos? Ili jam kuŝas unu sur la alia. Kaj oni ankoraŭ alportas novajn dek. Iliaj kunuloj ne volas ilin meti sur la kuŝantojn. Sed la pafilkolbo komprenigas al ili, ke ili devas tion fari. Ili plenplenigas la veturilon.

Sed ĉi tiuj ne estas mortintoj! Se ni portas ilin en hospitalon, por kuracado, kial do oni igas sufoki unun per la alia? Onódi sidigas



Pál Varsányi

"Hokokruco" - "Hokokruco" - "Hokokruco"

En la stato de ĝenerala subpremo

Pál Varsányi
Budapeŝto, 1933

Hokokruco.
Linograv. 1933.

apud mi sur la koĉerbenko. Kvar gardistoj nin akompanas piedire, po du dekstre kaj maldekstre.

Ni venas ekster la pordegon. Demande mi alrigardas la gardistojn: kien? Dekstren? Maldekstren? Samtempe ili signas: antaŭen. Antaŭen? Tie, kontraŭ ni, ja estas la argilkavo.

Ni ne komprenas tion. Nek mi, nek Onódi. Ĉe la rando de la argilkavo la gapantoj lasas al ni vojon. Ili nun ne estis tiomope, kiel tiam, kiam ni alvenis. Kruta vojo, irpremita de veturiloj, kondukas en la kavon. Sur la malvasta veturilspura vojo la tri ĉevaloj puŝadas unu la alian. Ili ne povas reteni la veturilon. Antaŭe, la timono svingiĝas dekstren-maldekstren. Jen la unu, jen la alian ĉevalon ĝi vangfrapas.

Ni ne havas multan tempon por medito, kial ne en la hospitalon oni ekspedas la vunditojn. Ni jam estas malsupre, en la kavo. Ni haltas antaŭ malgranda lignobudo.

Elvenis dek labservuloj. Neniu estis kun ili. Senkomande ili venis al la veturilo. Ili deprenadis la vunditojn. Mi konjektis ion malbonan. Ni ne kuraĝis paroli, nek ion demandi de la labservuloj. Mi provis paroli okul-lude. Ne estis eble. En la okuloj de tiuj jam mankis la vivo. Indiferente, senanime, kvazaŭ ili estus ne homoj, sed maŝinoj, ili trenis duope-kvarope la vunditojn al la argila rando kontraŭa al la subirejo.

Nia veturilo malpleniĝis.

— Ni reiru! sonis la komando. Malfacilege mi turnis la veturilon. Malfacilege, jes, mi ja atentis ne pri la ĉevaloj, sed pri tio, ke la labservulojn sekvas kvar germanaj kaj du hungaraj soldatoj. La germanoj havis maŝin-pistolon, la hungaroj manliheron. El bunkero ili elvenis, de apud la budo.

Mi sciis, ke la sorto de la vunditoj plenumiĝis.

Ni estas la koĉeroj de la mortoĉaro. De tiu ĉarbo, sur kiu oni portas la viktimojn anstataŭ sub la gilotonon, antaŭ la tubon de maŝin-pistolo. Ni ankoraŭ ne eliris el la kavo, kiam post ni eksonis la maŝin-pistoloj.

Supre — rikanaj vangaĉoj. En la mienoj — besta volupto. Oni kvazaŭ aŭdas, kiel ili spiregas de la plezuro de murdo.

— Joĉjo, kio estos? Mi tuj vomos — mi diras al Onódi.

GODIVA

William Auld.

(Godiva estis la edzino de Leofric, Grafo de Chester ekde ĉirkaŭ 1040. La legendo rakontas, ke ŝi estis tre kortuŝita pro la suferado de la urbanoj de Coventry, kaj petis al sia edzo, ke li forigu de ili premantan imposton. Tion li rifuzis „krom se ŝi rajdus tute nuda tra la urbo“. Ŝi traktis serioze lian kruelan ŝercon, kaj plenumis la kondiĉon, tiel devigante al li plenumon de lia promeso.)

Vi staras martelata de korbato,
Godiva, dam' de puro alabastra,
frapite de la vort' kruele drasta,
kraĉita al vi de la edz-amato;
en via sento luktas la kompato
al la amaso mizersorte fasta
kun la hontem', ke via nudo ĉasta
sin montru al okuloj de la strato.

Kompato gajnas: eĉ ne tremas manoj,
la robon faligante ĝis kalkanoj;
kaj tuj alian faras vi kostumon
el brilaj bukloj kaj el la rekono,
ke vin pravigas gloro de l'sindono.
Kuraĝe vi enpaŝas la sunlumon.

— Ankaŭ mi. Kvankam mi jam vidis tiaĵon. Brutoj. Ni defendas la kristanan kulturon. Ni kaj la germanoj.

Ni jam estas ĉe la fabrik-pordego. Ni veturas en la korton.

— Kossa, mi ne faros kun vi pluan turnon. Kio okazos, okazu. Kune kun ĉi tiuj mi batalis kvar jarojn. Mi ne estos koĉero de morto.

— Nek mi. Kion do fari?

— Haltigu tie la veturilon, kaj poste ni faros, kvazaŭ ni flankenirus por necesumo. Iel ni tamen eskapos.

— Kaj se oni nin kaptos.

— Nu maksimume oni starigos nin inter ilin. Plu bone, ol tiamaniere.

— Bone.

Ni ree haltis antaŭ la magazenspordo. Mi demetis la bridojn, karesis la kapon de la ĉevaloj. Ni volis flankeniri.

— Kien vi iras?

— Nur ĉi tien, sinjoro kaporalo, urini.

— Hej, je ĉiuj sakramentoj, kiel delikataj vi fariĝis! Trankvile vi povas feki-akvumi ankaŭ ĉi tie, ĉe la veturilo. Nur restu tie ĉi.

Mansigne mi demandis Onódi-n, kion fari. Li ŝultrotire, lipotaŭze signis, ke ankaŭ li ne scias.

Mi klopodadis pri la bridoj, ĝustigadis la jungilaron. Jam ĉion mi esploris, ĝustigis. Kion fari? Oĉjo Onódi komencis rampi sur la veturilon. Ĉu mi ne iru? Tiam oni min mortpafos samloke. Aŭ, ĉu mi atendu alian okazon de fuĝo?

Unu mia piedo jam estis sur la ĉarŝtupeto, kiam tra la pordego enkuregis la kaleŝo de Rotyits. Ĝi kuregis. Rotyits vipe batis la dorson de Oláh, kaj ĉi tiu ege kriante instigis la ĉevalojn por galopo.

La ĉirkaŭputa amaso dissaltis en mil direktojn. Siteloj, trinkiloj, tasegoj disfalis krakante. Sstis iu, kiu en sia timo grimpis, kvazaŭ sur maston, sur la ferkolonon/putan.

Oláh nun volis jam reteni la ĉevalojn. Li ne kapablis. La sovaĝiĝintajn bestojn eĉ plie timigis la dissvarmanta popolamaso. En la proporcie malvasta korto la du ĉevaloj kun la malpeza veturilo galopegis kvazaŭ senbremsiĝinta maŝino. De la kapo de Rotyits jam falis la ĉapo. Li hurlis. -Li sepsakra mentis. Ĉiel li volis kapti la bridojn el la manoj de Oláh. Eble ĉe la kvina rondiro, fine li sukcesis. Sed la ĉevaloj ne trankviliĝis. Onódi komencis sibli al ili. Je la trankviliga sono, fine tiuj cedis iom el la kurego, kaj la kaleŝo, cirklante ankoraŭ unu aŭ dufoje ĉirkaŭ la puto, haltis, ĝuste apud ni.

Rotyits desaltis la unua kaj tuj kuris al la ĉevaloj. Li dorlotis, karesis ilin. La ĉevaloj estis lia pasio. Li adoris la ĉevalojn.

Ununura polvo sur ilia felo lin furiozigis. La kompanio estis malpura, fetora, sordida, skabia, sed la ĉevaloj brilegis. La kompanio malsatis, ŝrumpis je skeletoj, sed la ĉevaloj grasiĝis rondaj. Ĉu mankas pano por la kompanio? Negrave, se estas aveno por la ĉevaloj. La kompanio tranoktas en dikverŝa pluvo, por la ĉevaloj necesas loko kovrita.

La hurlo de la kaporalo nin atentigis pri nia situacio.

— Supren, sur la ĉaron! Ni iru!

Tio koncernis min kaj Onódi-n.

— Ĉi tie estas nia ĉefserĝento, sinjoro kaporalo. Eble vi bonvolus paroli kun li.

— Ĉu min interesas via gorilo? Ni iru!

Mi pensis, ke Rotyits tamen nin rimarkos.

— Hola! Vin gardu — mi alkriis la amason, kiu, ĉirkaŭfermante la ĉefserĝenton, baris al ni la vojon.

Ĝuste mi kalkulis. Rotyits ekaŭdis mian voĉon.

— He, kion do vi faras? Kien do, en la ventron de via patrino, vi iras? Kio estas tio?

Li entiris la kapon inter la ŝultrojn kiel la saltopreta pantero.

— Kiu permesis al vi tion. Kie la barelo?

Lia buŝo ŝaŭmis de furiozo. La ringo cedis ĉirkaŭ li. Tamen li estis ĉefserĝento, kiu estas granda hundo eĉ tie ĉi en la fronto. La ĉirkaŭputuloj ja estis komunaj soldatoj, maksimume kaporaloj. Rotyits staris apud Onódi. Subite li kaptis la kitelon ĉe lia brusto kaj lin skuadis.

— Kion vi faris? He, maljuna simio, jam eĉ al vi oni ne povas ion konfidi?



Pál Varsányi

Memoro pri 1944.

Linogr. 1946.

— La sinjoro kaporalo nin devigis, sinjoro ĉefserĝento.

— Kie estas tiu sterko?

— Kio, sterko? — sin anoncis la kaporalo.

— Hu, ĉu do vi? — Nun 'li jam kaptis la kitelon de la kaporalo kaj surŝmiris al li du egajn vangfrapojn.

Ankaŭ tiu ne estis pigra. Li piedbatis la kruron de Rotyits. Kaj ili jam ruliĝadis unu sur la alia en la polvo kaj koto. La kaporalo estis la pli juna, pli forta. Li enpremadis la vizaĝon de Rotyits en la ĉirkaŭputan koton.

Ankaŭ Csikvári enmiksiĝis. Li provis ilin disigi. Ŝanceliĝante li tiregadis ilin.

— Tiu ĉi ja estas ebria — mi flustras al Onódi.

— Jes, ankaŭ la ĉefserĝo.

— Jam ankaŭ Csikvári kuŝas en la koto.

Formiĝis bela granda rondo. Ringe staris la cirko-rigardantoj, meze luktas ĉefserĝento de la hungara reĝa armeo, rotestro kaj kaporalo. Ili piedbatas, pugnas, ŝiras, sufokadas unu la alian. Edifa spektaklo.

Rotyits volas elkapti sian pistolon, dum la kaporalo trempadas Csikvári-n en la koton. Li ne havas tempon por tio. Kvin homoj lin subpremas.

Sed jen estas la ĉefleŭtenanto. Oni delasas la luktantojn. Rotyits sin anoncas la unua. Apenaŭ li povas stari sur la piedoj.

— Do, tiu veturilo apartenas al vi?

— Jes, al ni, kaj la sinjoro ĉefleŭtenanto ne havas rajton rabi ĝin. Pro tia afero vi riskas militjuĝistaron, sinjoro ĉefleŭtenanto.

— Fermu la faŭkon, oldulo, ĉar vin io trafos...

— Ke mi fermu, ke mi?... Hu!

Sed pli multe li ne povis diri, ĉar nun la ĉefleŭtenanto donis al li tian vangfrapon, ke li denove sterniĝis.

Kuŝante, li serĉadis pri sia pistolo. Ree oni lin subpremis.

— Portu ĉiujn tri en la kontoron — ordonis la ĉefleŭtenanto.

— Nu, Joĉjo, kio estos nun?

Ni forĝesis pri akvo, vunditoj, tagmanĝo, tiom ni venis sub la influon de la evento.

La korto nun jam estis tiel plena de homoj, ke apenaŭ oni povis sin movi. Unuj venis por akvo, aliajn alpelis la scivolo.

— Nu, oldulo, ni iru! Dum tiuj interne

EL „THYREA”

Sonetfasko el Sanatorio

John Ferguson.

Li malvarmumis ie en Lesterio,

Kaj venis li kun eta orprovizo

Al tiuj ĉi pureco, frosto, grizo,

Kie kunloĝas timo kun espero.

Li diris, kiel statas la afero:

Tusinte, trovis li sur la ĉemizo

Skarlatan fluon de la morta ftizo;

Kaj restos li, ĝis pasos for danĝero.

Hodiaŭ kun l' edzino li foriris,

Ĉar elĉerpiĝis lia montrezor':

Ne scii mi, ke velkas viv' sen or',

Ĝis adiaŭis li kaj sin fortiris —

Saneco, mono kaj espero for.

Kiom, ho Kristo, resti li deziris!

Tr. John S. Dinwoodie.

arangos la aferon, ni povas fari unu turnon — diris iu gardisto, kiu ankaŭ ĵus nin akompanis en la kavon.

— Ne eble, vi ja vidas, kia homo estas nia ĉefserĝento.

— Bone, bone, tamen ni iru!

— Oni ne povas elveturigi pro la multego da homoj.

— Mi faros vojon, ni nur iru!

Ni paŝis al la ĉaro, el kiu la stertoro jam apenaŭ aŭdiĝis. Nur etaj ĝemoj sonis. Ankaŭ nun oni surmetis ĉirkaŭ dudek vunditojn, ĵetante unujn sur la aliajn. Mi rigardis la plej suprajn. Jen juna blonda knabo. Eĉ dudekjara li ne estas ankoraŭ. En la loko de liaj okuloj estas du teruraj vundoj. Ne bandaĝitaj. Liaj blondaj haroj gluiĝis en liajn okulavojn. Li ŝajnas oficiro.

Li ek- kaj ektiras sian piedon; nur tio montras, ke li vivas. Sur la piedoj li havas delikatajn botojn. Apud li kuŝas aĝa homo, povus esti lia patro. Lia dekstra brako mankas ĝis super la kubuto. Ĝi estas nebandaĝita, nur ĉirkaŭpremita per rimeno. Lia vesto estas nura sango. Kelkfoje li malfermas la okulojn. La suno ilin enbrilas, tuj li ilin refermas. Apenaŭ li jam spiras. El lia buŝo en maldika ruĝa strio fluetas sango.

La amaso iom fortiriĝas. Ne pro tio, ke la gardisto ilin forpelas, sed, ĉar ili ne povas elteni la fetoron, kiu inundas el la veturilo kaj la magazeno.

(Fino sekvos.)

PEDAGOGIA EPOPEO

DU ĈAPITROJ

A. S. MAKARENKO

La kalvario de Semjon.

Komence de februaro, meze de la terkulturaj antaŭpreparoj en la kolonio subite aperis Karabanov. La infanoj feliĉe lin brakumis, kisis, sed li devolvis de si iliajn brakojn kaj rapidis al mi:

— Mi venis por vidi, kiel vi fartas?

Nuraj gajaj, ridetantaj vizaĝoj rigardis en la kontoron:

— Jen, Semjon! Rigardu do, Semjon estas ĉi tie!

Dum la tuta tago Semjon vagadis tra la kolonio, rigardis ankaŭ la Trepkebienon kaj vespere morne, silenteme sidiĝis ĉe mi:

— Rakontu do, Semjon, kiel vi fartas?

— Kion mi rakontu?... — Mi loĝas ĉe mia patro.

— Kaj kie estas Mitjagin?

— Ĉu mi scias tion? Mi lin forlasis. Mi kredas, ke li iris Moskvon...

— Kaj kiel vi fartas ĉe via patro?

— Nu, Dio scias... kiel oni povas farti en vilaĝo. Mia maljunulo ankoraŭ bone estas. Mian pli aĝan fraton oni mortigis...

— Kiel do?

— Mia frato estis partizano, la petljuranoj mortigis lin en la urbo, sur la strato...

— Nu, kaj nun kio estas via intenco? Ĉu vi restas ĉe via patro?

— Ne... Tie mi ne volas... Mi ne scias... Malcerte li sin ĝenadis, poste subite li eldiris:

— Anton Semjonoviĉ, diru, kio estus, se mi restus en la kolonio?

Rapidan rigardon li ĵetis al mi kaj poste klinis la kapon ĝisgenue.

Simple, serene mi respondis:

— Kial ne? Kompreneble, vi povas resti ĉi tie. Ni nur ĝojos...

Semjon eksaltis de sur la seĝo kaj preskaŭ tremis pro la sufokita emocio:

— Mi ne eltenas, ĉu vi komprenas, mi ne eltenas! En la unuaj tagoj, jes, sed poste — nu, vane, mi ne eltenas! Mi agis — faris, vagaĉis tien-reen, malbone eĉ pensi pri tio! Mi diras al vi nur: mi kutimiĝis al nia kolonio.

Mi mem ne scias, kio min turmentas; mi pensis, ke tio pasos, poste... estos, kio estos, mi venis ĉi tien, por almenaŭ iom ĉirkaŭrigardadi. Nu, kaj, ĉio, kion mi vidis ĉi tie, ĉio, kio okazas ĉi tie, mi povas diri, estas miraklo!

— Nu, ne ekscitiĝu tiom! — mi diris al li — vi estus povinta veni ankaŭ pli frue. Kial vi vin turmentis tiel longe?

— Jes, mi estus veninta, sed mi rememoris, kiajn porkaĵojn ni faris ĉi tie, kaj eĉ kiel mi fanfaronadis antaŭ vi, do...

Li mangestis kaj eksilentis.

— Nu, jam estas bone, ne pensu pri tio — mi diris.

Semjon levis la kapon singarde:

— Nur... eble vi nun opinias — kiel vi ja diris tiam —, ke mi koketas. Sed ne. Hej, se vi scius, se vi nur konjektus, kion mi spertis! Diru al mi sincere: ĉu vi fidas je mi?

— Mi fidas — mi diris serioze.

— Ne, sed vere — ĉu efektive vi fidas je mi?

— Iru en la inferon, stultulo! — mi diris ridante. — Mi esperas, ke ne ripetiĝos, kio tiam okazis...

— Nu vidu, tamen vi ne fidas tute...

— Kredu, Semjon, estas domaĝe tiel ekscitiĝi. Mi fidas je ĉiu, nur je iu pli, je la alia malpli: je unu ĝis kvin kopeĵkoj, je la alia ĝis dek...

— Nu, kaj je mi?

— Je vi — ĝis cent rubloj.

— Nu do, tion mi neniel povas kredi — kaj Semjon ekobstinis.

— Nu, tio mankis ankoraŭ!

— Sed egale, mi pruvos... kaj li foriris dormi.

De la unua tago li iĝis ĉefhelpanto de Scheere. Li havis evidentajn ter-kulturistajn inklinojn, multon li jam sciis, multo alia estis en lia sango „de lia patro, de lia avo“, tiu certa, heredita kamparana tradicio, sperto. Samtempe avide li glutis la novaĵojn de la terkulturo, la logikon kaj belojn de la ekonomia tekniko.

Jaluze li atentis pri Scheere kaj ĉiamaniere li volis pruvi, ke ankaŭ li ne laciĝas, ankau li ne postrestas. Nur la malvarmsangan trankvilon de Eduard Nikolajeviĉ li ne sciis alproprigi, ĉiam li ekscitiĝis, ĉiam bolis en li jen la indigno, jen la entuziasmo.

Proksimume post du semajnoj mi sendis venigi lin:

— Jen tiu ĉi rajtigo — mi diris simple — je ĝi vi ricevos kvincent rublojn en la financa oficejo.

Semjon larĝigis la okulojn, tute grizigis kaj apenaŭ povis elĝemi:

— Kvincent rublojn? Kaj poste?

— Kaj poste nenio — mi respondis, dum mi serĉadis ion en mia tirkesto — vi portos ĉi tien la monon.

— Ĉu mi iru per ĉevalo?

— Kompreneble. Kaj jen ankaŭ pistolo. Por ĉia eventualaĵo.

Tiun saman revolveron mi premis en la manon de Semjon, kiun aŭtune mi eltiris el post la zono de Mitjagin, en ĝi estis la samaj tri kugloj. Karabanov mekanike transprenis la revolveron, kun sovaĝa rigardo, rapide li ĝin enpoŝigis kaj senvorte elrapidis. Post dek minutoj mi aŭdis la hufferfrapadon sur la pavimo. La rajdisto forrajdis sub mia fenestro.

Ankoraŭ ne vesperiĝis, kiam Semjon venis en la kontoron, en la leda jako de la forĝisto, zonanta ĝin svelta ĉe la talio, sed iom morne. Senvorte li metis sur mian tablon la pakajon de la bankbiletoj kaj la revolveron.

Mi prenis la monon en la manon kaj per la plej ordinara voĉo de la mondo, sen ia akcento mi demandis:

— Ĉu vi ĝin kalkulis?

— Jes.

Per malzorga gesto mi ĵetis la monon en la tirkeston:

— Mi dankas vian penon. Iru manĝi.

Karabanov ĝustigis sian zonon, disrigardis en la ĉambro kaj respondis trankvile:

— Bone. — Kaj li eliris.

Pasis du semajnoj. Semjon, se li trafis en mian vojon, iom morne, preskaŭ honteme min salutis. Same morne li aŭskultis mian novan ordonon:

— Iru en la urbon, du mil rublojn vi devas alporti el la banko.

Longe, senkomprene li min rigardis, enpoŝigis la revolveron, poste, akre akcentante ĉiun vorton, li respondis:

— Dumil rublojn? Kaj se mi ne hejmenportos ilin?

Mi eksaltis kaj lin riproĉis:

— Mi vin petas, ne diru stultaĵojn! Vi ricevas komision, iru, faru! Mi ne estas scivola pri via filozofado!

Karabanov tiris la ŝultrojn kaj sendecide murmuris:

— Do, ankaŭ tiel estas bone...

Kiam li alportis la monon, denove li komencis:

— Kalkulu ĝin!

— Por kio?

— Mi petas, kalkulu ĝin!

— Sed vi ja kalkulis ĝin, ĉu ne?

— Tamen, kalkulu ĝin!

— Lasu min trankvila!

Je tio li kaptis al la gorĝo, kvazaŭ io lin sufokus, deŝiris sian kolumon kaj ekŝancefigis:

— Vi mokas pri mi! Ne estas eble, ke tiel vi fidas je mi. Estas neeble! Ĉu vi komprenas? Neeble! Vi intence riskas la monon, intence.

Sufokiĝante li sidiĝis sur seĝon.

— Multon kostas al mi via komplezo, mi povas diri.

— Kial? Kion?

— Mi devas alrigardi viajn historiojn...

— Anton Senjonoviĉ! — li kriis al mi kaj kaptis la fenestrokornicon.

— Sed kio do estas al vi? — mi demandis kaj nun ankaŭ mi iom ektimis.

— Se vi sciis! Se vi sciis, kiam tio mi galopetas sur la vojo, konstante mi pensas: hej, se Dio estus en la ĉielo! Se Dio almenaŭ sendus iun ĉi tien, el ĉi tiu arbaro, ke li min atakus!... Kaj se Li sendus dek, aŭ mi ne scias kiom... Mi pafus sur ilin, dente-unge mi atakus ilin, mi mordus, kiel hundo, ĝis ili murdus min... Vi scias, kelkfoje mi emus plori. Kaj mi pensas... Vi sidas ĉi tie kaj atendas: ĉu li alportos, aŭ ne alportos la monon... Vi ja riskas...

— Vi estas stulta, Semjon! La monon oni ĉiam riskas. Multan monon oni eĉ ne povas porti sen risko ĉi tien, en la kolonion. Sed mi pensas jene: se vi portas la monon, la

MALNOVAJ LAMPOJ

(Tezo Metrika)
Brendon Clark

I.

Tradukonte.

„La vivesenco de rimata traduko troviĝas en tio, ke bona poemo ne fariĝu malbona poemo. La sola vera motivo kial oni tradukas poezion en alian lingvon estas por doti alian nacion, kiom eble, per unu plua belaĵo. Ĉar la poezio ne estas preciza scienco, laŭlitereca tradukado estas tute flanka al tiu celo. Mi diras *laŭlitereca* — ne fidela, kio neniel estas la sama afero. Kiam oni povas kombini laŭliterecon kun tio, kio estas la precipa kondiĉo de la sukceso, la tradukanto estas bona, kaj li devas fari la plej-eblojn por ilin kunigi; kiam li povas atingi al tia celo nur per parafrazo, tiu estas lia sola vojo...

„La tasko de la tradukanto... postulas iom da memdeteno. Ofte li volonte utiligus ian apartan graciaĵon de la propra idiomo kaj epoko, se nur li mem estrus sian volon; ofte iu kadenco konvenus al li, krom pro la strukturo de la originalo — iu strukturo konvenus, krom pro la originala kadenco; ofte li devas malpliigi la ekbeliĝon de strofo por alpreni iun rimon kiu akordas, kaj li vidas la poeton feliĉe malŝpara pro vortabundo, kie li mem havas nur mizeran provizon. Jen, li volas malŝati la materialon por la muziko, jen la muzikon por la materialo; tamen ne: li devas trakti egale pri ambaŭ. Kaj kelkfoje difektaĵo en la verko agacas lin, kaj ege li volas forigi ĝin, kaj fari por la poeto tion, kion ties epoko malpermesis al li; tamen ne! — tio ne troviĝas en la kontrakto!“

(DANTE GABRIEL ROSSETTI, konata angla poeto, 1828—1882, en la antaŭparolo antaŭ *Unuaj Italaj Poetoj.*)

Iam kun fraŭlino ne de la Stelanoj,
Mi diskutis la poemojn nialingvajn,
Kaj mi plendis, ke la tradukitaj versoj
Ofte min malkontentigas pro tordiĝo
De la frazoj, elizio, kaj sklaveca
Imitado de l' originala formo.
„Kompreneble!“ kriis ŝi (kaj ne komprenis!)
„Via lingvo estas tute porsciencia:
„Kaj per tia idiomo, vortpreciza
„Kaj sensenta, ia poezio estas
„Nepre ekster la ebleco. Ĉiu vorto
„En nacia lingvo portas kun si aron
„De duonsignifoj kaj nuancoj, kiujn
„Oni ne tradukas; kaj la poezio
„Fontas el la feinejo de l' pensombroj.“

„Tamen vi malĝuste taksas nian lingvon,“
Mi protestis. „Porsciencia, jes! Sensenta —
„Tute ne! Mi plendas ne pri neebleco
„De la tradukado — nur pri la metodo,
„Kiu tro kripligas nian Esperanton.“

La fraŭlino kape dubis: „La nuancoj...“
„Iugrade, amikino, vi ja pravas
„Pri nuancoj; tamen vi forgesas, ĉu ne,
„Ke ideoj ankaŭ havas kromnuancojn? —
„Kaj ke Esperanto traktas pri ideoj
„Pli ol vortoj? Jen ekzemplo: Per 'fantomo'
„Oni traktas ne pri vorto, sed koncepto
„Kiun ĉiu raso konas — ĉirkaŭ kiun
„Ĉiu raso jam almetis la nuancojn,
„Kiel ajn ĝi nomas ĝin en sia lingvo.“

risko estas malplia. Vi estas juna kaj forta, vi bonege rajdas, vin ne povas facile kapti la vojrabisto... min ili kaptus pli facile.

Je tio Semjon feliĉe palpebrumis:

— Nu, kiel ruze vi elpensis tion, Anton Semjonoviĉ.

— Nenia ruzo estas en tio. Vi jam scias kiel porti la monon kaj ankaŭ plue vi ĝin alportos. Kial tio estus ruzo? Mi ne timas. Mi scias, ankaŭ vi estas tiel honesta kiel mi. Jam delonge mi scias tion, ĉu vi ĝin ne rimarkis?

— Ne, mi kredis, ke vi tion ne scias, —

diris Semjon. Kaj kiam li foriris, lia laŭta kantado alarmis la tutan kolonion:

Ekflugis la forta aglo
Al montsupro alta,
Bonan manĝaĵon ĝi trovas,
Kriĉas pro la ĝojo.

„Ne suferigu la infanon!“

En oktobro okazis la malfeliĉo ĉirkaŭ Arkadij Uĵikov. Iun ferian tagon venis al ni gaste niaj studentoj. Por nokto ni lokis ilin en iu lernoĉambro, tage ni faris ekskurson kun ili en la arbaron. Dume Uĵikov sin ŝtelis

Ree la fraŭlino dube kapon skuis:

„La konceptoj povas esti mem malsamaj.

„La demokrateco de la okcidento

„Fremda estas al la orienta menso.“

„Tamen ambaŭ ŝatas laŭdon pri la vorto!“

Tie ni forlasis la diskuton, ŝi

Dubante, mi des pli ankoraŭ konvinkite.

Ĉu ne mi tralegis kun simpatie

La poemojn de verkistoj alilandaj?

Ĉu ne el diversaj landoj mi ricevis

Pruvon, ke legantojn miaj versoj trafis?

Kvazaŭ per miraklo, nia lingvo rompas

Ĉian malfacilon inter la nacioj.

Dum la homoj teorias, ni praktikas,

Kaj la mankoj kiujn ili antaŭvidas,

Montras sin 'fantomoj'.

*

Kial ni tradukas?

Mi de la knabeco sentis, ke la vortoj

Estas kvazaŭ kugloj el alia cerbo —

Kvazaŭ lumradioj, aŭ elektraĵoj tremoj,

Kiuj pereigas la malĝustan kredon,

Montras la belecon, aŭ stimulas penson.

Kiu amas lingvon estas jam poeto:

Kiu amas du, fariĝos tradukanto.

Jen, en nia lingvo juna, purvokala,

Kia manko de la tradukitaj verkoj!

Kia nesufiĉo de la poezio

Kiu tro abundas en aliaj lingvoj!

Konsentite, ke sur tiu nova maro,

Jam troviĝas iuj bravaj argonaŭtoj,

Kiuj inter nekonataj danĝerejoj

Kun kuraĝo direktadas siajn ŝipojn.

Tien ili portas vivon kaj trezoron,

Kaj postlasas avertilojn por aliaj.

Sed por ni averto estas nur logilo,

Kaj pensante pri la preskaŭ virga lingvo,

Ni komprenas, kion sentis KEATS, legante

La unuan fojon, la Ĉapman-an Homer:

Jen, mi sentis kiel stel-observemuloj

Pri planedo nova, sur la noktbieno;

Aŭ Kortezo, kiam vidis la okuloj

Sur la Pacifikon — kaj per mirmieno

Ĉiu homo mutdemandis al kunuloj

Silentantaj super monta Darieno.

(Mi ignoras la eraron historian:

Tradukanto estas nur alia voĉo

De l' poeto, kaj ĝustigi aŭ klarigi

Ian tekston li ne devas, eĉ ne rajtas —

Kvazaŭ la poeto estus neklerulo,

Kaj legantoj malinteligentaj homoj

Komprenantaj nur poemojn por infanoj.

Lerte tradukitaj versoj alsimilas

Belulinon, kiu portas novan robon

Kaj ŝajnigas laŭkutima la novaĵon

Per inece kalkulitaj malatentoj.

Laŭ la vortoj de l' poeto ROBERT HERRICK:

Dolĉa malordeco ĉe la vestoj

Trafas kiel koketecaj gestoj —

Tolmuslino gaja kaj ekscita

Lerte sur la ŝultrojn surjetita —

Liga laĉo, kiu tro obstina

Flirtas ĉe l' frontaĵo karmezina —

Konfuzita fluo de rubandoj

Nezorgita ĉe manumaj randoj —

Faldo — alloganta vidokupo —

En tumulte susuranta jupo —

en la ĉambron de la studentoj kaj forŝtelis aktujon, en kiu estis la stipendio de ili ĉiuj, tiel, kiel ili ĝin ricevis, la tuta sumo. La kolonianoj amis la studantojn tiel, ke „kvardek mil fratoj ne povus ami plie“. Terure ni hontis pro tiu ŝtelo. La ŝtelisto dum certa tempo povis sin kaŝi en la ombro de nekonateco, sed ne tiu cirkonstanco estis por mi grava. En komuneco la ŝtelado estas terura, ne tial, ke io perdiĝas, kaj ankaŭ ne tial, ke iu suferas malutilon, eĉ ne tial, ke ankaŭ la ceteraj povas sekvi la malbonan ekzemplon — sed ĉefe tial, ke ĝi ĝenas la reciprokan fidon,

vivigas la plej malagrablajn instinktojn de la suspekto kaj estigas maltrankvilon, incitas la bagatelan egoismon. Se oni ne trovas la farinton, la kolektivo tuj disiĝas je pluraj partioj: en la dormoĉambroj oni flustradas. kaŝeme oni nomas la suspektitojn, ĉiuj devas elteni plej gravajn sortprovojn, plejofte ĝuste tiuj, kiujn oni devus indulgi, kies karaktero ankoraŭ ne estas formiĝinta. Eĉ se post kelkaj tagoj oni trovas la ŝteliston, eĉ se li ricevas sian indan punon — vane, tio jam ne kuracas la vundojn, ne mildigas la suspektojn, ne restarigas la trankvilon de la kolek-

tivo. Sur bazo de tia, ŝajne izolita, kazo povas evolui la ĝermoj de la plej plena fremdiĝo, malamikeco, izoliĝo, eĉ efektiva hommalamo. La ŝtelo nur tie ne estas tiel malutila fenomeno, kie ankoraŭ ne troviĝas elformiĝinta ĝenerala opinio; en tiu kazo la afero estas simpla: iu ŝtelis, alia estas priŝtelita, la ceteraj restas ekstere. En kolektivo la ŝtelo suprenportas ĝis tiam kaŝitajn pensojn, velkigas la reciprokajn paciencon kaj fidon tiel necesajn en la kolektivo, kaj tio precipe detruas efikas je kolektivo konsistanta el tiel nomataj krimuloj.

La kulpeco de Ujikov malkovriĝis nur la trian tagon. Tuj mi fermis lin en la kontoron kaj ordonis gardiston antaŭ la pordon por malhelpi memjuĝajn agojn. La konsilantaro de la ordonantoj decidis, ke ĝi portas la aferon antaŭ la popoljuĝistaron. Tia juĝistaro malofte kunsidis ĉe ni, ĉar la infanoj ĝenerale fidis je la juĝo de la konsilantaro. Ujikov nenion bonan povis atendi de la popoljuĝistaro. La juĝistojn la ĝenerala kunsido delegis; unuanime ĝi elektis la jenajn kvin knabojn: Kudlatij, Gorkovskij, Zaiĉenko Stupiĉin kaj Pérec. Ĉiu juĝis pri Stupiĉin, ke li estas justa kaj la ĉeesto de la tri unuaj knaboj certigis, ke la juĝo ne estos milda.

Vespere komenciĝis la traktado. En la plenplena ĉambrego aperis ankaŭ Bregel kaj Druĵinskaja, kiuj ĝuste por tio venis nun al la kolonio.

Ujikov sidis sur apartigita benko. En tiuj ĉi tagoj li estis terure impertinenta kontraŭ mi kaj kontraŭ la kolonianoj, konstante li malĝentiladiĝis kaj mokadis — vekante per tio efektivan ĝeneralan naŭzon kontraŭ si. Jam de pli ol unu jaro li estis en la kolonio, sed dum tiu tempo sendube li vekis ĉiam pli kaj pli malbonan impreson. Eble li plie zorgis pri si, ne tiom li pendigis la nazon, eĉ rideti li lernis. Sed vane, tiu estis ankoraŭ la malnova Aradij Ujikov, kiu neniun respektis en la mondo, malpleje la kolektivon — lin hejtis ekskluzive nur la avaro.

Antaŭe Ujikov timis la patron, timis la policon. En la kolonio nenio lin minacis, nur la konsilantaro de la ordonantaro, aŭ la ĝenerala kunsido de la kolonianoj, sed tiuj ne tuŝis lin ĝis nun. Lia sento de respondeco obtuziĝis eĉ pli, kaj de tio devenis lia novspeca rideto, novece impertinenta vizaĝ-esprimo.

Sed nun lia vizaĝo estas verda-blua: evidente timigas lin la juĝista korporacio de liaj kunuloj.

Ĝuo, kies kapricema nodo
Tamen estas laŭ ĝentila modo —
Tiu pli min sorĉas, ol la arto
Tro preciza kaj en ĉiu parto.

Do, simile ĉe la tradukitaj versoj:
La originala penso restas sama,
Eĉ la atmosfero de l' originalo;
Se la robo estas nova, kaj malkaŝas
Tie-tie, trajtojn de la novmodisto:
Jen detalojn en inversigita ordo,
Jen malsaman, tamen trafan, sonimiton,
Aŭ hazardan ripetadon de literoj —
Eble tio povos gajni admirantojn
Kiuj ne rimarkis la antaŭan ĉarmon.

*

Kiel vortserĉanto en la leksikono
Forlogiĝas per aliaj vortotrovoj,
Tiel mi, vagante sur la vastaj kampoj
De la angla poezio, perdas min;
Kaj inter tiom da belaĵoj ne povante

Kontraŭstari de la multaj flankaleoj
La inviton, mian celon mi forgesas.
Poezio kunkombinas la floreon
De la pensoj kun muziko de la vortoj,
Kvazaŭ en ĝardeno sonus simfonio.
Kiajn orkestranojn tie ni aŭskultas!
Ties muzikadon mi ne ĝuste ŝatis,
Antaŭ ol mi penis ilin interpreti.

*

Kiel Aladino antaŭ la kaverno
Staras mi, fidante al magia vorto,
Kaj spirito kiu en malnova lampo
Loĝis tra jarcentoj, tamen tuj sin montros
Kiam mi per kelka peno lin alvokos.
Multaj estas la kavernoj de l' saĝeco:
Do, elportu la antikvajn lumigilojn,
Kaj forviŝu nun la polvon de la jaroj.
Tiam ni retrovos la perditan brilon,
Kaj sorĉistoj gvidos nin al novaj riĉoj.

(Daŭrigota)

La deĵoranta ordonanto anoncas, ke venas la juĝistaro. Kudlatij komencis la aŭskultadon de la atestantoj. La konfesoj jam antaŭ ĵetis la ombbron de la plej severa juĝo. Misa Ovčarenko diris:

— Ĉi tie la infanoj diras, ke tiu ĉi Arkadij portis honton al la kolonio. Sed mi diras, ke ne estas tiel, ĉar ne estas eble, ke tia ulo povu porti al ni honton. Li ne estas koloniano. Tute ne! Ja eĉ tion oni ne povus diri, ke li estas homo. Juĝu vi mem: ĉu homo estas tia ulo? Mi diras je mia vorto, ke eĉ la hundo aŭ la kato lin superas. Se nun vi demandas, kion ni faru pri li, ni ja ne povas fari, ke simple ni lin eljetu, tio ne helpas al li. Prefere mi proponas: oni fermu lin en porkujon kaj oni devas lin instrui, ke li boju. Se dum du-tri tagoj oni manĝigos lin tie, certe li tion lernos. Sed en la ĉambron oni ne povas lin enlasi.

Ofenda, eĉ neniiga parolo ĝi estis. Vajna Zajĉenko, ĉe la tablo de la juĝistaro preskaŭ krevis de rido. Arkadij serioze rigardis al Misa, ruĝiĝis kaj forturnis sin.

Nun Bregel petis vorton. Kudlatij demandis:

— Eble post la aliaj?

Sed Bregel volis paroli, li iris supren al la katedro kaj faris efektivan oratoradon. Kelkajn detalojn de lia parolo eĉ nun mi memoras:

— Vi volas juĝi ĉi tiun knabon, ĉar li ŝtelis monon. Ĉiu postulas lian severan punon, eĉ troviĝas, kiuj volas lin forigi. Kompreneble ankaŭ li estas kulpa, sed eĉ pli kulpaj estas la kolonianoj.

La ĉambrego mutiĝis, la infanoj etendadis la kolon por rigardi tiun, kiu asertas, ke ili estas la kulpaj en la ŝtelo de Uĵikov.

— Dum tri jaroj li vivas inter vi kaj tamen li ŝtelas. Tio signifas, ke vi malbone lin edukis, ne tiel vi proksimiĝis al li, kiel vi devus, vi ne klarigis al li, kiel oni devas vivi. Ĉi tie nun oni diras, ke Uĵikov laboras malbone, ke ankaŭ antaŭe li priŝtelis siajn kunulojn. Ĉio ĉi pravas, ke vi ne sufiĉe lin priatentis.

La akraj okuloj de la buboj fine rimarkis la minacan danĝeron kaj maltrankvile ili rigardadis al la pli aĝaj kunuloj. Oni devas rimarkigi, ke ne senkaŭze ili maltrankviladis, ĉar en tiu ĉi momento la sorto de nia ko-

lektivo vere estis en serioza danĝero. Sed Bregel ne zorgis pri la kreskanta ekscitiĝo de la ĉambrego, per granda impeto li finis jenesian parolon:

— La puno de Arkadij estus afero de la venĝo, sed ni ne povas nin malaltigi ĝis venĝo. Vi devas kompreni, ke Arkadij nun bezonas vian helpon, ĉar li estas en malfacila situacio, ĉar ĉi tie lin ĉiu atakas, oni eĉ komperas lin al besto. Oni devas komisii kelkajn

AMO

L. Tárkony.

Mi sinkis super vin, amata,
en beata deliro,
al via sava sino rifuĝis mia sovaĝe barakta
sopiro.

Kiel sin ĵetas bebo malsata
al mamio patrina por avida sorbo,
tiel falegis mia buŝo al la via en sorĉa
absorbo.

Ho dolĉa, senpova, feliĉa-malfeliĉa, eterna turmento,
ke neniĝinte unu en alian, ni renaskiĝu en unu korpo!

Deziro kaj turmento lante nobliĝis muta tenera volupto;
tiam per kiso silenta mi adiaŭis vian buŝon kaj levis la kapon por rigardo.

Kiu vi estas, kiun antaŭ minutoj mirakle naskis por mi petola humoro de blanka aŭgusta ardo?

Kiu vi estas, ke post kiso via ĉi kison mi replorus en ĉiu kiso alia? Kiu vi estas, ke en via brakpremo retroviĝas mia perdita memo de la dronintaj junaj jaroj?

Kiaj estas viaj haroj? Kiaj estas viaj okuloj? La fermitajn palpebrojn vi apertis lante. Kaj dum ĉe viaj lipoj ludis rideto de patrino lulanta, en via okulvarmo sombris praaj malĝojnebuloj.

Kaj por frata tristo ekvibris mia koro, ho mia duono en ĉi morna mondo de brunaj turbuloj, kaj mi refalis inter viajn brakojn konsolajn kaj ni petis por indulgo per doloraj sanktaj brakumoj

la blindan potencon de la fato tronanta inter neniam-pasaj stelolumoj.

Siringo-florado

L. Tárkony.

Ĉi posttagmeze inter floraj
siringabetoj mi promenis.
Matene turpaj nigraj nuboj
ankoraŭ sur ĉiel' sin trenis,
el sin' ilia falis pigraj
pluvgutoj peze tra l' nebuloj,
'sed posttagmeze tra ilia
krevinta brusto blu' serenis,
mildige cedis la severaj,
frostkoraj majaj tri sanktuloj.

Kaj ankaŭ al mi sur l'animo
degelis krusto la glacia,
l'okuloj sorbis bluan, blankan,
rozan kaskadon de koloroj,
de branĉ' al branĉo ŝanceliĝis
la naz' kiel rabist' ebria,
por unu horo mi min trempis
en ban' freŝiga de la floroj.

Unu branĉeton de siringo
en mian ĉambron mi kunportis,
inunĉas tie el ĝi feste
ĝiaj odoroj sorĉe-sanktaj,
la vortoj, kiujn de semajnoj
poltrone, morne mi abortis,
libere, forte al la altoj
elflugas nun, ebrie kantaj,
ĉar posttagmeze mi promenis
inter siringoj disflorantaj...

knabojn, ke ili prenu lin en sian zorgon kaj helpu al li.

Kiam Bregel forlasis la estradon, la vicoj ekmoviĝis, la knaboj komencis ridi, bruadi. Iu el ili demandis per serioza voĉo:

— Kial li diris tiaĵojn? kial?

Alia voĉo iom pli mallaŭte, sed sufiĉe mallice respondis:

— Miaj infanoj, helpu al Uĵikov!

Rido trakuris la ĉambron. Zajĉenko, la juĝisto refalis sur sia juĝista seĝo kaj per la piedo li frapis la tablo-tirkeston. Kudlatij severe lin admonis:

— Vajna, mi ne komprenas, kia juĝisto vi estas?

Uĵikov nur sidis, sidis, sin klinante super la genuon, subite rido krevis el li, sed rapide li disciplinis sin kaj klinis la kapon ankoraŭ pli profunden. Kudlatij volis diri ion al li, sed li pripensis kaj, balancante la kapon, nur per la rigardo lin batis.

Bregel ŝajne ne rimarkis ĉi tiujn etajn scenojn, ĉar vikle li pritraktis ion kun Djurinskaja.

Kudlatij anoncis, ke la juĝistaro sin retiras por konsilado. Ni sciis, ke kostas almenaŭ unu horon, ĝis la juĝo estos konceptita. Mi do invitis niajn gastojn en mian kontoron.

Djurinskaja sin tiris en angulon de la divano, Guljaeva sidiĝis post ŝia dorso kaj evidente esploris la veron sur la vizaĝoj de la ĉirkaŭantoj. Bregel estis konvinkita, ke hodiaŭ li donis lecionon „pri la vera pedagogia laboro“. Mi rigidiĝis en ian strangan obstinon. Ĝi ne estis obstino de la malkaŝemo aŭ de la triumfo — ne. Sed obstine mi dronis en la dezertan senton pri l' senfrukteco de mia laboro.

Bregel turnis sin al mi:

— Vi kompreneble pravigas min, ĉu ne?

— Ĉu vi deziras tason da teo? — mi respondis.

En tiuj ĉi homoj troabundas la silogismo. Tiu ĉi rimedo estas bona, la alia estas malbona, do ĉiam la unua estas aplikenda. Kiom da tempo estas necesa, ĝis oni povas ilin instrui pri la dialektika pensado! Kiel mi pruvu al ili, ke mia laboro konsistas el plimalpli longaj operacioj — certaj daŭras eĉ jarojn — kaj krome ĝi portas en si tiajn kunpuŝigojn, kiuj ligas en komplikan teksaĵon la interesojn de la kolektivo kaj de la individuo. Kiamaniere mi konvinku ilin pri tio, ke dum mia sepjara laboro en la kolonio mi ne havis tute similajn du kazojn. Kiel mi komprenigu al ili, ke antaŭ kolektivo ne licas vekti la impreson de la sendecideco, malcerteco de la ago, de la senpovo de la publika opinio kaj ke la objekto de la hodiaŭa prijuĝo ne estas Uĵikov, eĉ ne unuope la kvarcent kolonianoj, sed la tuta kolektivo, universale.

La deĵoranto vokis nin en la ĉambregon: La kolonianoj ekstaris kaj en plena silento aŭskultis la juĝon, kiu tekstis jene:

Uĵikovon, kiel malamikon de la laborantoj kaj kiel ŝeliston oni devus forigi el la kolo-

nio. Sed, konsidere ke la Instrua Popolkomisariaro interesiĝis pri li — la juĝistaro de la kolonianoj decidis:

1. Uĵikov restas en la kolonio.

2. Por unu monato li ne estas rigardata kiel koloniano, li estos elfermita el la laborroto, estos malpermesate al la kolonio paroli kun li, en io ajn helpi al li, manĝi ĉe la sama tablo kun li, dormi en la sama ĉambro kun li, ludi kun li, sidi apud li, promeni kun li.

3. Li restas sub la gvido de lia ĝisnuna ordonanto, Dimitrij Jevelij, en oficiala afero li rajtas paroli kun sia ordonanto kaj — se li malsaniĝus — kun la kuracisto.

4. Uĵikov dormas en la koridoro de la dorm-ĉambrego, manĝas sola ĉe aparta ĉambro, kaj se li volas labori, laŭ la instrukcio de sia ordonanto li povas labori nur sola.

5. Kiu malobeas ĉi tiun decidon, laŭ la decido de la konsilantaro de la ordonantoj tuj devas forlasi la kolonion.

6. La juĝo post la aprobo de la kolonidirektoro tuj validiĝas.

La kunsido de la kolonianoj akceptis la juĝon kun aprobo.

Bregel per oficiala voĉo alparolis min:

— Vi kompreneble ne aprobos tiun ĉi decidon?

— Mi devos ĝin aprobi — mi respondis.

Djurinskaja en la malplena ĉambro de la ordonanta konsilantaro vokis min flanken:

— Mi volas paroli kun vi. Kion signifas tiu ĉi decido? Kiel vi opinias pri ĝi?

— Mi tre aprobas tiun ĉi decidon — mi diris al ŝi. — La apartigo kompreneble estas danĝera rimedo kaj ĝenerale ĝi ne estas rekomendinda, sed en tiu ĉi kazo ĝi estos utila.

— Ĉu vi estas certa pri tio?

— Tute certa. Rigardu, tiun ĉi Uĵikovu oni ne amas en la kolonio, ĉiu malestimas lin. La apartigo de la knabo por unu monato, kiel mi diru, leĝigas tiun ĉi rilaton. Kaj se Uĵikov bone eltenos tiun ĉi provon, li povas nur levigi en la okuloj de la ceteraj. Por Uĵikov tio estos pripensinda tasko.

— Kaj se li ne eltenos?

— Tiam la kolonianoj forpelos lin de ĉi tie.

— Kaj ĉu vi tion permesus?

— Jes.

— Tamen, kiel tio estas ebla?

— Kaj kiel estus eble alie? La kolektivo havas rajton por la sindefendo.

— Eĉ se Uĵikov pereas pro tio?

— Uĵikov trovos por si alian ĉirkaŭaĵon. Ankaŭ tio estos por li nur utila.

Djurinskaja demandis kun malĝoja rideto:

— Kaj kiel ni nomu ĉi tiun pedagogion?

Antaŭ ol mi povus respondi, ŝi mem eltrovis:

— Eble la pedagogio de la batalo?

— Estas eble.

Bregel prepariĝis por foriro. Lapotj alportis la tagordonon:

— Ĉu ni subskribas, Anton Semjonoviĉ?

— Kompreneble. Ĝi estas tre ĝusta decido.

— Vi pelos la knabon al memmortigo, — diris Bregel.

— Kiun? Uĵikovu? — miradis Lapotj. — Al memmortigo? Ho, eĉ ne estus malbone... sed, bedaŭrinde, li ne pendigos sin.

— Tio do, simple, estas teruraĵo — diris Bregel forirante.

Tiuj ĉi virinoj malbone konis Uĵikovu, malbone konis la kolonion. Komence la kolonianojn rekte distris la bojkoto. Efektive ili ĉesigis ĉian kontakton kun Uĵikov, sed jam ne estis en ili furiozo, nek malestimo — ili jam ne malamamis ĉi tiun ulon. La juĝista decido kvazaŭ ĉion al si prenis. De malproksime ili kun granda interesiĝo akompanis Uĵikovu kaj inter si ili ofte pritraktis la aferon kaj ties atendeblajn sekvojn. Laŭ la opinio de multaj la juĝo estis tro milda. Al ili apartenis ankaŭ Kostja Vetkovskij:

— Ĉu tio do estas puno? Li ja promenas kvazaŭ heroo. Kompreneble, kiam la tuta kolonio lin gvatas. Ĉu li meritas tion?

Uĵikov vere pozis kiel heroo. Lia vizaĝo decide alprenis memfidan, fieran esprimon. Kvazaŭ reĝo li iradis inter la ceteraj kolonianoj, ja neniu rajtis lin alparoli, neniu kuraĝis lin demandi. En la manĝoĉambro la tableton por li apartigitan li rigardis sia propra aparta trono.

Sed la heroo pozo baldaŭ lin forlasis. Post kelkaj tagoj Arkadij eksentis la dorsojn en la florkrono de la honto, kiun la kamarada juĝistaro premis sur lian kapon. La kolonianoj baldaŭ kutimiĝis al lia apartigo, kaj la izoligo ne mildiĝis. Arkadij komencis gustumi la amarajn tagojn de la plena so-

leco, kiuj kreskis el longa vico de malplenaj, longaj horoj kaj el kiuj mankis eĉ la plej eta varmo de la homa ĉirkaŭaĵo. Sed dum tiu tempo varmege pulsas la vivo de la kolektivo, oni ridadis, ŝercadis ĉirkaŭ li, formiĝis amikecoj, simpatoj. Kiel ojn dezerta estis la estajo de Uĵikov, tamen li kutimiĝis jam al ĉi tiuj ĝojoj. Kaj tial lia sento de manko pliiĝis de tago al tago.

Post unu semajno lia ordonanto, Jĵevelij diris al mi:

— Uĵikov petis permeson, ke li povu paroli kun vi.

— Ne, — mi respondis. — Mi parolos kun li nur, se li honore eltenos la provon. Diru tion al li.

Kaj baldaŭ kun ĝojo mi rimarkis, ke la ĝis tiam senmova brovo de Arkadij jam estas kapabla je apenaŭ rimarkebla, sed multsignifa falto. Li komencis longe, meditante, preskau revante rigardi siajn kunulojn. Ni ĉiuj povis observi, kiel alimaniere li laboras nun. Jĵevelij ordinare donis al li taske la balaadon de la kortego. Arkadij komencis fari la laboron plej precize: li balais la grandan kortegon, malplenigis la balaajkestojn, purigis la florbedojn. Ofte eĉ je vesperiĝo li aperis en la kortego kun sia ŝovelilo, kolektis la hazarde faligitajn paperpecon aŭ cigared-restaĵojn, kontrolis, ĉu la florbedoj estas en ordo. Tutan vesperon li plenigis per tio, ke sur la tablo de iu klasĉambro li fabrikadis ion sur granda folipapero kaj matene sur videbla loko li elmetis la surskribon:

„Koloniano, estimu la laboron de via kamarado kaj ne jetu paperpecojn sur la teron!“

— Nu — diris je tio Gorkovskij — li rigardas sin kamarado...

Meze de la provomonato de Uĵikov aperis en la kolonio kamarado Zoja. Estis ĝuste tempo de tagmanĝo. Zoja iris rekte al la tablo de Uĵikov kaj vekante la atenton de la silentiĝintaj kolonianoj, ekscitite, per postula voĉo diris:

— Ĉu vi estas tiu Uĵikov? Diru, kiel vi fartas?

Uĵikov ekstaris kaj serioze rigardante al Zoja, respondis:

— Kun neniu mi povas paroli, nur se la ordonanto permesas.

Kamarado Zoja iris serĉi Mitjka-n. Mitjka freŝe, kuraĝe staris antaŭ li:

— Kion vi volas?

— Permesu, ke mi parolu kun Uĵikov.

— Ne, — estis la respondo.

— Kio estas tio: ne?

— Mi ne permesas, estas finite!

Kamarado Zoja venis en mian kontoron kaj komencis:

— Kio estas tio? Kaj se hazarde li havas plendon? Kaj se li jam venis al la rando de la abismo? Ĉu vi volas lin turmenti, ĉu?

— Mi povas fari nenion, kamarado Zoja. La sekvan tagon dum la kunsido de la kolonianoj Natasa Petrenko petis voĉon:

— Knaboj, nun ni jam pardonu al Arkadij. Li laboras orde kaj la punon li eltenis honore, kiel decas al koloniano. Mi proponas, ke ni donu al li amnestion.

La kunsido aprobe muĝis.

— Tion oni povas fari... Jes.

— Uĵikov tre ŝanĝiĝis...

— Jes, eĉ kiom!...

— Estas jam tempo por pardono...

— „Helpu al la infano!“

Oni petis la opinion de la komandanto. Jĵevelij diris:

— Mi diras serioze: li fariĝis tute alia homo! Kaj kiam hieraŭ venis tiu... nu, kiel oni nomas lin... vi ja konas...

— Jes, ni konas!

— Nu jes: infano tiel, infano tiel — sed Arkadij eltenis. Antaŭe ankaŭ mi kredis, ke oni ne povas sukcesi pri Arkadij, sed nun mi diras: en li ja estas io... do per unu vorto, li estas nia homo!

Lapotj rikanis:

— Per unu vorto: amnestio?

— Voĉdonigu!

Uĵikov sin apogis al la kameno kaj klinis la kapon. Lapotj rigardis tra la denso de la levitaj manoj kaj anoncis gaje:

— Nu, ... ŝajnas, ke sen kontraŭdiro... Arkadij, kie vi kaŝas vin, venu. Vi estas libera, mi gratulas!

Uĵikov iris supren sur la estradon, rigardis al la kolonianoj, malfermis sian buŝon por paroli kaj — ekploris.

Ekseĉto trakuris la ĉambron. Iu ekkriis:

— Li diras ja morgaŭ...

VILAĜIRADO

K. KALOCSAY

I.

Ŝarĝaŭto sur landvojo kuras
dimanĉe en mateno frua:
la laboristoj alveturas
vilaĝon en humoro brua.
Al fratoj-kampanoj venas
kun helpo la vilaĝirantoj,
kaj laŭ la voj' la kampo plenas
de gajaj laboristaj kantoj:

„Niajn kantojn gaje portas
la vento,
vilaĝiras laborista
taĉmento.
Frat' kampulo, jen la mano,
ĝin prenu,
malriĉulon malriĉulo
subtenu!

La tegmenton de l'ernejo
ni faros,
ponton, puton, laborilon
riparos.
Ankaŭ l'pastro ridu fine
sen veo:
iru bapti al sentrua
preĝejo!

En vilaĝmezo la ŝarĝaŭto haltas,
la laborista grupo de ĝi saltas.
Kunvokas la kampulojn la gvidanto,
kaj, laŭ la senco de la supra kanto,
rakontas, kial venis lia grupo.
Sed entuziasmon li ne tre rikoltas:
la homoj staras kun suspekta dubo,
kaj liaj vortoj senresone mortas.

Ja suspektinda estas ĉio urba:
sinjora ruzo, kampultrompo turpa,
jen kion memorigas por averto
al la kampuloj la jarcenta sperto

ĉe la aŭskulto de promesoj belaj.
Do ili staras mute kaj rigide,
kaj, kvazaŭ ili estus surdorelaj,
disiĝi ili volas malkonfide.

„Aŭskultu, homoj, ni nenion petas,
ni volas helpi!“ la gvidant' ripetas.
„Ĉu vi ne havas ion riparotan,
se ne alian, truan fundon potan?
Riparon ni senpage entreprenas.“
„Pro kio do?“ demandas homo aĝa.
„Pro kio? Nu, ĉar interapartenas
la laboruloj urba kaj vilaĝa.“

Rompiga fine tamen la glacio,
kaj vigle, kun kurioza ambicio
la laborista grupo eklaboras,
martelas, ĉizas, gisas, raspas, boras.
Kiel la frat' pli aĝa al pli juna
sindone helpas la vilaĝiranto
al la kampul' ĝis la subiro suna,
festante la dimanĉon per ekkanto:

La marteloj gaje bruu,
la patrujon ni konstruu,
hura hej!
Por ni mem ni ĝin konstruas,
nia ŝvito por ni fluas,
hura hej!

Plan' trijara en la vejnoj,
el la ruboj kreskos hejmoj,
hura hej!
Unu-du-tri-jara duro:
por ni floros la futuro,
hura hej!

*

Hej, brilaj ventoj blovas
flagon en aero,
hej, estas surskribite:
vivu la libero!

Sed Ujikov viŝis siajn okulojn kaj mi bone
lin rigardis: mi vidis, ke li suferas. Fine li
povis ekparoli:

— Mi dankas, knaboj, knabinoj... Nataŝa,
ankaŭ al vi... Mi... umo... ĉion mi kom-
prenas... ne pensu... Mi petas...

— Forgesu! — diris severe Lapotj.

Ujikov kapbalancis obee. Lapotj fermis la
kunsidon kaj la infanoj kuris al la estrado
kaj ĉirkaŭprenis, per la oro de sia simpatio
kompensis Ujikovon.

Mi ekspiris, kiel kuracisto post krani-
operacio.

El la rusa: L. Skit.

Hej, brilaj ventoj, blovu;
flago, ŝvelu ventel
Ĝis morgaŭ ni la mondon
turnos fundamente.

*

Mi jam skribos sur la murgazeto pri mia plendafero
per funebre nigraj literegoj sur flamruĝa papero.
Mi surskribos: mian koron ŝtelis de mi ama pirato,
ĝin ordone al mi redonigu la Uzin-Komitato.

Sed la U. K. tiel min respondis je akuza pretendo,
ke la U. K. en aferoj amaj estas sen kompetento.
Kies koron oni ŝtelis, tiu ĝin reŝtelu per finto,
kaj, se lerta, ŝtelu ankaŭ kune koron de la ŝtelinto.

*

Jam ree produktas fabrikoj,
kaj muĝas la radoj dum kur',
dirante al mil mil amikoj:
al la laborist' la futur',
al la laborist' la futur'.

La hejm' ree hejmo jam estas,
viv' kreskas el ruboj de mur',
kaj trans ĉia plag' manifestas:
al la laborist' la futur',
al la laborist' la futur'.

Plenigu nin ago kaj volo,
ni kreu en nobla konkur'.
Patrujon konstruas popolo
por la laborista futur',
por la laborista futur'!

Vespere, kiam nia grup' ekiras,
ĉar jam la okan montras la horloĝo,
demandas la gvidant': „Ĉu vi deziras,
ke ni revenu?“ „Jes“ — respondas voĉo
de homoj pluraj. Montras jam simptomoj,
ke iom cedas la anim-rezistoj.
Avinjo diras: „Ha vi, bonaj homoj!
Domaĝe, ke vi estas komunistoj.“

II.

Do — la uzin' adoptis la vilaĝon,
aranĝas tien la vizitvojaĝon
en ĉiu tago de dimanĉo,
kaj en ĉi nesto post la dors'de Dio,
droninta en la marĉ' de apatio,
pli kaj pli jam montriĝas ŝanĝo.

La kamparanoj jam ne staras gape,
kiam la laboristoj martelfrape
klopodas por ilia bono,
el la fervoro mem instigon ĉerpas,
ĉe l'rekonstruo de la ponto helpas
ne atendante je admono.

Jam ili havas emon eĉ kunsidi.
Ho, kia ĝojo estas al ni vidi
la diskuteman kompanion!
Liberiĝinte de l'ĝendarm-infekto,
ili sen ruze straba cirkonspekto
eldiras sian opinion.

La turon de l'preĝejo bombo frapis,
la sonorilon la saguloj rabis
por ĝin transfandi je kanono,
sed inĝenier' alvenas, planon faras,
kaj sekvas granda tag': la turo staras.
Eĉ, jen, por Pentekosta dono,

mister', de kie, venas sonorilo,
kaj kiam el la turo kun jubilo
ĝi eksalutas helsonore.
moliĝas eĉ la pastro katolika,
kaj li ne povas en parol' publika
ne diri sian dankon kore.

Kaj tiel, de vizito al vizito
ŝanĝiĝas la malfido kaj la spito,
je amikeco kaj je amo.
Iudimanĉe la vizit' forrestas.
Tuj ekscitite la vilaĝ' protestas
per urĝe plenda telegramo.

Por granda bat' al loka reakcio,
estiĝas fine la traktor-stacio
gapata mire, kun respekto,
eĉ, kiel realiĝon de miraĝo,
en iu tago festas la vilaĝo
la enkondukon de elektro.

Vespere en la nova vilaĝklubo
programas la uzina kultur-grupo
kaj faras grandan sensacion.
Ĉeestas eĉ la menciita avino
kaj ridas, larmas, provas eĉ je l'fino
kunkanti la Internacion.

Francisko la Fuŝulo

Reto Rossetti

Oj! diris al si Francisko — denove mi fuŝis! Malgaje li taŭzis la blondan stupokapon kaj rigardis la lernejan balprogramon, kiun li arte elliteris. Tie, anstataŭ la orda ero „Valso“ aperis nigre, akuze, ridinde, la nomo „Valeria“! Reve laborinte, li ne atentis kaj lasis sin forporti de la tri unuaj literoj por la perfido de ŝia nomo. Kion fari? Kaj ĉu tiu terura, ĉiam perfekta, ĉiam senmanke elturniĝa Viktoro jam rimarkis lian eraron?

Momente al li ŝajnis ke lia klaskamarado, serene laboranta super sia balprogramo, ĵetis ekrigardon el la okulangulo sur lian folion, sed tuj poste li konkludis, ke ne. Viktoro nenion vidigis. Lia nigra, glate frizita kapo ne moviĝis, la belaj trajtoj, krom eta leviĝo de la brovo kaj enigma ombro de rideto ĉe la buŝo, esprimis neniom pli, ol serena masko. La mano de Viktoro glate moviĝis sur la papero, formante la literojn. Francisko preskaŭ forrigardis, kiam io ekforĝis lian atenton. Viktoro, anstataŭ skribi la vorton „Tango“, skribis „Tanja“ — la nomon de sia lerneja amatino. Diablo! denove li lecionas al mi, pensis Francisko singulte, kaj kiel birdo hipnote rigardas serpenton, tiel li fikse rigardis la folion de Viktoro dum tiu senĝene ŝanĝis la „j“ je „g“ per du plumstrekoj kaj, skrapinte parteton de la „a“ per klingo de poŝtranĉilo, facile ĝin ŝanĝis je „o“.

Denove li montras al mi kiel fliki eraron, malĝoje pensis Francisko, — kaj denove lia metodo taŭgas nur por lia okazo, sed ne por mia! Kion mi faru? Mi ne povas tiel facile ŝanĝi „Valeria“ je „Valso“, kiel li reŝanĝis „Tanja“ je „Tango“!

„Vik“, li petis, „mi faris eraron. Ĉu vi ne povos konsili al mi, kiel bonigi ĝin? Jen v-vidu,“ li balbutis, kaj forte ruĝiĝis, ĉar li konsciis, ke la montrado de tio, kion Viktoro jam ekvidis, estas mizera farso.

„Ha, kia domaĝo, Franĉjo“, diris Viktoro per sia bele modulita voĉo, tute sentreme, kvazaŭ li nur tiam ĝin ekvidus. „Vi devos fliki tion antaŭ ol la profesoro revenos! Sola rimedo estas glui pecon da papero super la eraron kaj reliteri. Sed ne tranĉu la paper-

flikon — ŝiru ĝin. Tiel la rando estos ne-regula franĝo kaj oni ne rimarkos ĝin, sed rektan randon de flikanta slipo oni tuj rimarkas.“

Dum Francisko riparigis, li diradis al si: „Jen, jen, jen! Ĉu mi ne povus tion elpensi? Ho, senrimeda fuŝulo!“

*

La artklaso estis fatala por la kompatinda Francisko. La postan semajnon, dum li prilaboris dekoraĵon, pri kiu la profesoro postulis, ke ili libere ĝin kreu, granda guto da punca farbo falis de lia peniko sur la paperon. Ĝi displaŭdis je granda, senforma makulo sur la pura papero. Ve! Kion fari? Certe tio jam estis neriparebla! Sed tuj Francisko haltigis la malesperon, kaj preminte la dentojn en la malsupran lipon komencis furioze pensadi. Rimedo estas! mi devas trovi ĝin mem por konfuzi tiun ĉiopovulon! — li obstinis. Tamen kio? Ĉu surglui papereton? Ne, la formo estas tro malregula kaj disetendita, kaj eĉ kun satelito-makuletoj! Ne, li devas skrapii ĝin. Unue, tamen, la sorban folion. Li prenis kaj per ĝi sekigis la makulon. Dum tio Viktoro ete turnis al li la kapon kaj balancis ĝin aprobe. Diablo prenu lian aprobon! — pensis Francisko dentgrince, preskaŭ plore, — mi ja povas rebonigi ĝin sen lia degna kontrolado. Li komencis skrapii, skrapii la paperon.

Ju pli li skrapis, des pli la signo malbeliĝis, des pli la papero ŝiriĝis kaj la makulo tute ne malaperis. Li haltis kaj fatale sentis turniĝi la kapon al Viktoro. Tiu sidis kun la peniko, graveda je ruĝa farbo, tenata super sia papero. Pum! — ekfalas granda guto, farante grandan, ŝprucan makulon sur la papero de Viktoro.

Serene, ne rapidante, Viktoro prenis la sorban folion kaj sekigis la makulon. Poste li prenis el sia ilo-saketo pecon da paŭspapero, kaj detale kopiis la neregulan formon. Kaj decide li rekopiis sian eraron, aplombe, egalspacè, tra la tuta papero, ricevante per tio — tre originalan, tre efektan dekoraĵon!

*

Du poemoj

Annette Droste-Hülshoff

Mi — sur balkono ĉe l'alta tur',
Ĉirkaŭe — krianta birdaro.
Sovaĝe, kun bakhantina plezur',
Nun flirtu en vent' la hararo!
Ho vento sovaĝa, vi, fajra dand',
Mi vin ĉirkaŭprenus kun forto,
Kaj tiam luktadus mi, tute ĉe l'rand',
Kun vi je vivo kaj morto!

Mi vidas, kiel kun ĝua obstin',
Simile al dogoj ludantaj,
La ondoj malsupre pelas sin,
Dum ŝprucas ŝaŭmflokoj grandaj.
Ho salti mi volus nun sen bar'
En la hundaron frenezan,
Kaj ĉasi en la korala arbar'
Rosmaron, kaptaĵon gajecan.

Jen flirtas tie transe sen tim'
Flageto kvazaŭ standardo,
Al kil' konstante turnanta sin
Fiksiĝas mia rigardo.
Ho, mi dezirus sidi sur ŝip'
Kun mano sur direktilo,
Transgliti en ĝoja ebrio ĉe rif'
Samkiel mevo-flugilo.

Ĉasisto estus mi kun plezur',
Soldat' mi volonte min nomus,
Se viro mi povus esti nur,
Konsilon ĉiel' al mi donus.
Sed oni, kvazaŭ infanon, min
Obee sidi devigas,
Por vent-flirtig' nur kaŝe, kun tim'
Mi mian hararon malligas.

★

Post morto kiu min gardos
Ameme en la memor'?
Ja larmojn oni ekverŝos,
Sed ĉesos sendube la plor'.
Postmortajn kantojn kantotajn
Forblovos la tempo-flu',
La eblan memoro-ŝtonon
La neĝo kovros sen bru'.

Kaj se degelos la neĝo
Kaj kantos birdoj sen ĉes',
En mia mortago nur restos
Memore la sankta mes'.

El la germana: *Hilda Dresen.*

La poetino Droste-Hülshoff mortis en 1848, antaŭ cent jaroj. Karakterize estas, ke ŝi mal-kontentis siatempe pri sia ĉirkaubarita virina sorto, suferis pro la manko de libero kaj sopiris esti viro (H. D.).

Francisko estis lerta knabo, multe pli intelekta kaj sprita ol Viktoro, — sed kion tio helpis, kiam eĉ lia sprito perfidis lin, kaj li devis ankaŭ en tio esti savata de sia perfekta klaskamarado?

La okazo estis la jena. Unu tagon la art-profesoro konstatis, ke membroj de la klaso iom post iom estis tute forŝtelintaj faskon da bonaj, zibelharaj penikoj el la glaso en la ŝranko. Nu, kion alian li atendis? Li estis bona homo, kaj la klaso siaflanke povis eĉ pretendi, ke ĝi estas klaso da bonaj knaboj; sed, se la profesoro ne kontrolas kaj la knaboj trovas la akiron de tiuj tre dezirindaj penikoj facila afero — ĉu oni povas miri pri tio?

Vere, ankaŭ la profesoro konsciis tion. Pli, li ne povis nei, ke li iom memoretis, ke li mem, dum li estis lerneja knabo... Sed tamen la perdo de la penikoj estis grava

kripligo de la art-ekipo. Kaj sekve li komencis admoni la klason. Lia voĉo severe-indigne sonoris:

„Vi ja ĉiuj sciis pri miaj verdastangaj penikoj: sciis, ke ili estas la plej bonaj. Se iu el vi pentradis kaj ne bone regis la penikon, ĉu mi ne diris al vi afable kaj bonkore: „Iru, prenu verdastangan penikon!“ Per tio mi volis helpi al vi, sed vi, pluigante mian konsilon, helpis al vi mem. Vi forprenis miajn penikojn — kiacel? Vi ja nur nocas al vi mem, ĉar pluraj el vi havas nun hejme penikon, kiun vi ne scias trafe uzi, kaj ĉi tie en la lernejo, kie vi povus fari bonan laboron, vi nun ĉesas pentri. Mi ĉesigas vin. Vi ja scias, el kia abismo de malkapablo mi dum la lasta jaro tiris vin, ĝis fine vi komencis krei aĵojn valorajn kaj rigardindajn — kaj nun vi sabotas vin mem. Vi forprenis la ilojn for de la loko, kie vi povis plej frukte uzadi

ilin, kaj vi tenas ilin tie, kie vi malmulton faros kaj baldaŭ elĉerpos vian kreemon. Kaj tiam vi flankelasos la penikojn kaj ili faros nenion, dum la tuta lernejo suferas pro ilia manko. Nu, mi ne pledas la redonon de la penikoj. Mi nenion petas de vi. Mi traktis vin amike kaj fide, kiel min mem, kaj mian bonecon vi rigardis kiel molecon, mian fidon vi rigardis kiel ion ekspluatindan. Tiel vi misuzis viajn liberojn kaj sekve nun vi perdas ilin. Ĉar tio estas leĝo, eĉ en la granda mondo...“

He, kion li esperas per tia predikado? pensis Francisko. Ĉiuj liaj sentencoj kaj belaj vortoj ja nur ventolas la orelojn de la klaso. — Francisko ĉirkaŭrigardis, kaj vidis serion da dolormontraĵoj, afekte senkulpaĵoj, esprimoj, esprimoj de ŝoko, de intensa atentado, de honto pro la krimaj klaskamaradoj! Ho, kiel lerte la knabo scias ŝajnigi kontraŭ la aŭtoritataj plenkreskuloj.

Tiun vesperon Francisko verkis poemeton pri la temo, kaj la sekvintan matenon li kaŝe ĝin montris al la amikoj dum la artleciono. Sed ve al Francisko, filo de malfelico! Ĝuste dum unu knabo redonis la versaĵon al li, la profesoro ekleviis la kapon kaj rimarkis la movon. „Francisko Bali! Donu al mi tion, kion vi ĵus ricevis de Stefano Ŝnak!“ Kun profunda ĝemspiro Francisko transdonis la folion al la profesoro, kiu laŭtleĝis:

„Kun indigno kaj doloro
Aŭdis mi, ke nia klaso
Ŝtelis dum art-lerna horo
La penikojn el la glaso.
Sentis mi ĉagrenon tian,
Ke preskaŭ mi redonis mian!“

La profesoro peze stertoris, turnis sin malrapide al Francisko kaj — — —

Sed ĉi tie mi devas intermeti la klarigon, ke efektive Francisko ne estis preninta unu el la penikoj. Pro la spritajo li eĉ sin mem ne domagis. Li riskis aŭdace, kaj li perdis, ĉar nun lia versaĵo staris en monstra, nenegebla akuzo kontraŭ li mem.

„Bali“, tondris la profesoro, „Ĉu vi skribis ĉi tion?“

„J-jes, s-ro profesoro.“

Antaŭ ol la profesoro povis reparoli, Viktoro salte leviĝis.



Pál Varsányi Lavistino. Lignograv. 1934.

„Sinjoro profesoro, mi petas — mi prenas pri tiu versaĵo la tutan kulpon sur min mem!“

„Kion vi volas diri per tio?“ tre surprizite diris la profesoro. „Ĉu ne Bali ĵus konfesis, ke la versaĵon skribis li?“

„Li diris la laŭvortan veron, s-ro. Li ĝin skribis, li ĝin kopiis, sed mi ĝin verkis.“

„Do, mia aplomba konfesanto, vi sekve nun konfesas, ke vi ŝtelis unu el miaj penikoj?“

„Tion ne, s-ro profesoro. Mi ne ŝtelis. Mi skribis la versaĵon nur pro ŝerco. Mi ekpensis la spritajon kaj mi priverkis ĝin. Jen estas ĉio.“

Tiu konsterna aplombo forprenis al la profesoro la regadon pri la situacio. „Bali, — ĉar via klaskamarado konfesis aŭtorecon de la versaĵo, vi povos reiri al via loko. Kaj vin“, li diris al Viktoro, „ni priatentos poste.“

Francisko sentis varmegajn larmojn de indigno brogi al li la okulojn. Jen denove tiu Viktoro lecionis al li! Aplombege li demonstiris al li, Francisko, lian rolon, savante

lin kaj sin per monstra mensogo, kiu, en la buŝo de Francisko, estintus la vero! Sed ĉu Francisko estus povinta sin savi per la vero tiel certe, kiel Viktoro savis ilin ambaŭ per la mensogo?? Kaj jen Viktoro kaperis aŭto-recon de lia versaĵo, kaj la kompatinda Francisko eĉ ne havas la eblon protesti pri tio!

*

La jaroj pasis, kaj ankoraŭ daŭris inter la du junuloj la interrilatado, por Francisko embarasa sed senevita, por Viktoro senĝena kaj triumfa.

Viktoro edziĝis kun Tanja, kiu elkreskis pompa virino, multe kapabla lin helpi en lia profesio. Sed Francisko ne elakiris sian Valerian: anstataŭe lin edzigis, sub formo de ĉarma virino, diable ruza serpento kun temperamento kaj kapablo lin kokri konstante.

Tamen Viktoro kaj Tanja ofte vizitas ilin, kaj oni eĉ diris, ke la superafabla Viktoro eĉ vizitis la domon iafoje dum la foresto de la edzo, sed pri tio mi ne povas certe diri. Mi scias nur, ke tio, ĉu vera, ĉu malvera, aldonas nenion al la esenco de la situacio, ĉar unu amanto pli aŭ malpli al Dorja jam ne signifis; kaj aliflanke se Viktoro ankaŭ en tio ĉi fervoris por plenumi kontentige taskon, kiun Francisko nur fuŝe faris, nu, ankaŭ tio prezentis nenion en la afero.

Nur pri tio mi scias, ke al Francisko la senanimaj objektoj daŭre ribelis en la manoj, kaj ke ofte ripetigis, ke Viktoro nete kaj lerte demonstris al li la korektan metodon. Eĉ tre simplajn taskojn Francisko ne

kapablis ĝuste interpreti, kaj tiel nepre li fuŝadis, ke fine li ne sciis, ĉu ne pli bone tamen estas havi la ĉeeston de la korektanta kaj hontiga Viktoro, ol tute detruiri la laborojn per sia propra, senhelpa procedado.

Unu tagon post periodo de pluvo, la frontpordo ĉe Francisko ŝvelis kaj fiksiĝis en la kadron tiele, ke la edzino devis tre forte tiri aŭ puŝi ĝin por ĝin malfermi. Kiam Francisko revenis en la vespero. Dorja petis lin aranĝi la pordon. Francisko esploris ĝin kaj konstatis, ke tio estas simpla afero: temas nur pri raboti iom la supran parton de la pordo. Sed tiam estis jam mallume, kaj ĉar estis tempo de milito, la blindumo funkciis. Egale, pensis Francisko: ĝi ja estas tre simpla tasko, eĉ palpe en la mallumo mi povas ĝin fari.

Li iom rabotis la flankan eĝon de la pordo kaj provis ĝin. Diablo, ĝi eĉ pli forte fiksiĝis! Li ŝiris ĝin aperta kaj rabotis pli draste. Provis — nekredeble — ĝi ŝajnis eĉ pli firme enfiksita! Bone, diris Francisko energie, se ĝi bezonas fundan kuracon, ĝi jam ricevos! Li rabotis kiel piŝto, la rabotaĵoj flugis en la mallumo, li sentis ilin tuŝi lian vizaĝon dum falo — jen, nun certe estos sufiĉe! Li batfermis la pordon, kaj subite tra la *fermita* pordo, en la mallumo, li vidis tramvagonon pasi sur la strato!

Kio tute ne venis al li en la kapon, estis tio, ke la pordo premiĝis al la kadro ne flanke ĉe la gambo, sed supre ĉe la lintelo!

Alian fojon li havis originalan ideon ĉar-penti krudan ŝrankon en la kelo. Ĉar li tute malfidis sian povon mezuri teorie la tabulojn,



Pál Varsányi

Laborista
sepulto
Linogr. 1934.

li decidis komenci najlante la dorson de la ŝranko al la muro, kaj en tiu fiksa pozicio munti ĝin peco post peco, alnajlante laŭvice ĉiun parton. Nu, tio *preskaŭ* estis brila ideo. La sola detalo, kiu maltrafis, estis tio, ke li surŝraŭbis la ĉarnirojn de la pordoj *inverse* tiel, ke la pordoj ne povis malfermiĝi eksteren, sed volis malfermiĝi internen, kio estis neebla.

Unu tagon kiam Tanja kaj Viktoro faris viziton, ili rimarkis, ke unu seĝo estas pli malalta ol la aliaj.

„Ĉu ĉi tiu seĝo estas malpara?“ demandis Viktoro. „Ne“, konfesis Francisko. „Ĝi estis tute egala, sed dekomence havis tiun difekteton, ke la kruroj ne estis tute ebenaj, kaj la seĝo balanciĝis. Nu, mi provis diversfoje segeti la krurojn por fari ilin egale longaj, sed mi atingis nur tion, ke la seĝo fariĝis pli malalta, sed ĝi ankoraŭ balanciĝas.“

„Kiom da kruroj vi prisegis?“

„Nu, laŭ tio, kiom da kruroj ŝajne kulpis,“ diris Francisko.

„Ne povas kulpi pli ol *unu* kruro,“ diris Viktoro. „Alportu al mi segilon.“

Li levis la seĝon sur la tablon tiel, ke, tri el la seĝopiedoj estis sur la nivela surfaco kaj la kvara trans la rando. Turninte la

seĝon prove, li tre baldaŭ trovis la piedon, kiu trans la rando montriĝis iomete pli longa. Li markis la plilongecon laŭ la tabla nivelo, desegis la troaĵon kaj — prete!

Alian fojon li trovis Franciskon sidanta ĉe tablo kun lampŝirmilo, kies veleno havis longan, disbranĉan fendon.

Francisko levis la okulojn de la ŝirmilo kaj diris: „Halo' Viktoro — sed ĉi tiu jam estas tute ne kuracebla!“

„Lasu vidi“, respondis Viktoro per sia flegma, preciza voĉo. Kaj ankoraŭ unu fojon la nesolvebla solviĝis. Per manikura tondilo Viktoro pligrandigis kaj ĉirkaŭtondis la fendan linion ĝis ĝi ricevis la formon de nimfo ĉasata de faŭno, kiu ĝuste tuŝis al la posten flirtanta mano de la fuĝantino. Poste li gluis diafanan paperon interne por fortikigi la pritonditan velenon kaj jen — tre originala kaj ĉarmefekta lampŝirmilo!

★

Ankoraŭ pasis pluraj jaroj, sed la amikoj ne revidis sin. Francisko ŝajne transloĝiĝis ien kaj Viktoro ne sukcesis informiĝi pri lia nova adreso.

Unu tagon okazis, ke Viktoro vizitis la ĉefurbon, kaj post pritrakto de siaj aferoj restis al li iom da tempo ĝis la horo de foriro de lia trajno. Estis agrabla aŭtuna tago kaj Viktoro eliris sur la stratojn por iom etendi la krurojn.

Malgajeta humoro obsedis lin. Laŭvide li ne estis multe aliĝinta, sed la eta ŝanĝo konstatebla iris profunden. Ia stranga grizeco de animo lastatempe pli kaj pli ofte okupadis lin. Estis ja sence. Ĉu li ne estis s-ro Viktoro Kolsa, la sukcesa aferisto, li kun la bela kaj eficienta edzino, kiu tiel kapable partoprenis lian vivon, helpante en liaj aferoj, akceptante liajn komerc-kunulojn, ĉiel utilante kaj akcelante lian prosperan karieron? Ĉu li ne estis ege feliĉa kaj eviinda?

Subite lia okulo trafis freŝe pentritan nomtabulon de butiko —

FRANCISKO BALI PETOLAĴ-BUTIKO

Ha, jen do kien trafis Francisko! Tuj la kimeraj nuboj forflugis de la animo de Viktoro. Lia humoro leviĝis, gajiĝis, kaj li sentis, ke verŝajne ĝuste ĉi tiu estis mankinta



Pál Varsányi

Karcero

Linogr. 1936.

al li — la societo de lia amiko, tiu beata fuŝulo, tiu bonanima dikfingrulo Francisko! Vigle li transiris la straton kaj enpaŝis en la butikon.

Kiam Francisko aperis, la surprizo kantis en lia voĉo. „Hej, ĉu vi, Viktoro? Post tiom

kaj misfunkcias senintence. Nun mi fine trovis mian medion — lokon, kie ĉio misfunkcias *intence*. — Ĉu vi fumas? Ne, mi kore petas — prenu de mi.“ Li proponis paketon da cigaredoj, sed kiam Viktoro etendis la manon, ŝpruco da akvo el la paketo



Pál Varsányi

Socialismo

Lino-gr. 1936.

da tempo? Hojla, mi pensis, ke la mondo vin glutis!“

Ankaŭ Franciskon la jaroj ne multe ŝanĝis, pensis Viktoro. Ĉiam ankoraŭ la samaj malordaj haroj el blonda stupo, kaj al tio nun malorda bohema kravato flirtis ĉe lia kolo. Certe li iom dikiĝis, kaj liaj vangoj eĉ roziĝis kiel du pomoj, dum lia voĉo ŝajne perdis la hezitecon de la antaŭa tempo.

„Sidiĝu, Viktoro!“ invitis Francisko, indikante seĝon. Viktoro sidiĝis kaj — pum! — la seĝo kunfalis sur la plankon. Kiam la surprizita Francisko releviĝis, la seĝo resaltis al sia antaŭa formo kaj Francisko kore ridadis.

„Nia gumpieda seĝo!“ li klarigis. „Pardonu! — provu ĉi tiun alian — ĝi ne kunfalos.“ Li alŝovis duan seĝon, sed apenaŭ Viktoro sidiĝis, jen sub li aŭdiĝis raŭka trumpetsono.

Francisko forte ridis. „Tio estis nia 'Malronka Kuseno' — tre ŝatata artiklo! Jes, vi trovos mian butiketon tre gaja...“

„Sed kial vi transiris al tiu ĉi okupo?“ demandis Viktoro.

„Ĉu vi ne klare komprenas? La tutan vivon mi estis fuŝulo, al kiu ĉio maltrafas

trafis en lian okulon. Viktoro mienis truditajn rideton.

„Dankon, mi prenos unu de miaj!“ kaj li elpoŝigis propran paketon kaj prenis cigaredon. Francisko, kun tre senkulpa mieno donis al li fajrilon, kiu tuj dissaltis en dudek pecojn. Pro surprizo Viktoro faligis el la buŝo la cigaredon, kiun Francisko kaptis en aero kaj redonis al li. Li ekbruligis ĝin, tiris tri profundajn fumtirojn por trankviligi siajn nervojn, kaj estis tuj parolonta, kiam krak! la cigaredo eksplodis.

Francisko ridis plengorĝe. „Alia populara numero,“ li klarigis. „Mi ĝin ŝanĝis, kiam mi kaptis vian cigaredon dumfale.“

„Kia senbrida petolulo vi fariĝis!“ diris Viktoro acidete. „Lasu min nur ekfumi cigaredon mian; mi petas, kaj poste vi povos — se tia estas via humoro — demonstri al mi la ceterajn spasme ridigajn varojn de via stoko!“

„Jen estas via paketo, vi lasis ĝin sur ĉi tableto,“ diris Francisko, ankoraŭ ridante. Viktoro malfermis ĝin singarde kaj atente ekzamenis la enhavon. Jes, tio estas liaj cigaredoj. Li prenis unu en la buŝon. Rapide Francisko proponis al li skatolon da alu-

metoj, kaj aŭtomate Viktoro ĝin prenis, por ellasi ĝin tuj el la mano.

„Alia altdebita numero!“ ĝoje klarigis Francisko, „— nia konvulsia alumetskatolo.“

Kiam Viktoro fine ekbruligis sian cigaredon, la atmosfero pleniĝis de la plej teruraodoro. Francisko ridegis, apogante sin ĉe la servotablo. „La stinkaj kugletoj!“ li kriis, kaptante la spiron inter spasmoj de ridado. „Mi ŝovis unu en vian cigaredon dum vi ne atentis. — Tre popu — —“

„Certe! — ankaŭ tre populara numero,“ bruske interrompis Viktoro. „Kaj sendube vi havas ankoraŭ centojn da egale sukcesaj petoliloj.“

„Diablo! Ĉu ŝi ne lasas al vi eĉ iomete de via propra animo?“

„Mi ne komprenas, kion vi volas diri per tio,“ respondis akre Viktoro.

„Nu, ne gravas. Se mi mistrafis, mi tiom pli ĝojas.“

Sekvis silenteto kaj Francisko komencis turni la kapon al siaj bretoj, plenaj de Ŝajnegaj Ŝercoj, Senofendaj Sensacioj, Petolaj Populariloj kaj Ridigaj Receptoj. — Viktoro rapide rigardis sian horloĝon. — „Pardonu — mi devas iri nun por mia trajno,“ li diris.

Nu, feliĉan vojon, Viktoro. Kai se iam vi troviĝos denove en la ĉefurbo, venu volonte



Pál Varsányi

Bakejo

Linogr. 1947.

„Nu jes; krom tiuj, kiujn vi jam ekkonis, troviĝas la kutimaj: la stinkobomboj, la jukpulvoro, la inkmakulo, la vizaĝnigriga sapo — —“

„Sufiĉas, sufiĉas!“ petis la bedaŭrinda viktimo, kaj serĉante ŝanĝon de temo, kiu donacus al li iom de la iama supereco super Francisko, li aldonis — —“

„Kiel vi estas kun via edzino?“

„Ŝi?“ ridetis Francisko. „Ho, ŝi forkuris antaŭ longe kun alia viro — dank' al ĉielo kaj feliĉon al ili ambaŭ! Kaj via edzino?“

„Tre bone,“ respondis la alia. „Tanja estas modela helpo al mi en la akcelado de miaj aferoj, la partopreno en miaj gustoj kaj interesoj kaj la orda aranĝado de mia vivo.“

min vidi! Adiaŭ, do,“ diris Francisko, etendante la manon.

Kiam Viktoro ĝin premis, aŭdiĝis forta eksplodo. La nervoj de la kompatinda Viktoro jam ne eltenis. Li eksaltis kaj forrapidis senplue, apenaŭ, aŭdinte la lastajn vortojn de Francisko:

„Nia manpetardo, tre popu...“

Sed ne la sovaĝa petolado de Francisko, en kiu koncentriĝis la revenĝoj de dek kvin jaroj, lin agitis kaj premis, sed unu okaza rimarko, kiu ankoraŭ vibris dolore en lia interno:

„Diablo! Ĉu ŝi ne lasas al vi eĉ iomete de via propra animo?“

En tiu momento li sentis sin en taŭga humoro por mortiĝi.

UNU SOLA ROZO

Lis Byrdal

Iam estis tre bela kaj ankaŭ tre fiera markizino. Si vivis ĉe la kortego de T'Sunreĝo, kaj oni diris pri ŝi, ke la viroj, kiujn ŝi beatigis per sia favoro, je ŝi sopirsuferis ĝis sia lasta tago kaj neniam trovis kontenton kun iu ajn alia. Jes, tiel oni diris — kaj kelkfoje ankaŭ ŝi mem diris tion akompane de petolema arĝentsonora rido.

Kiam ŝi troviĝis proksime al spegulo, ŝi turnis sin antaŭ ĝi — kaj kiam ŝi en la parko venis al la orfiŝa baseno, ŝi fervore sin klinis. Kaj nek spegulo nek akvo iam ajn reflektis pli ĉarman bildon. Ŝi posedis plej sveltan talion, plej rondan buston, plej fieran nukon kaj plej altan pieddorson inter ĉiuj damoj de l' kortego — krom okuloj kiel violoj post pluvo. Tre facile kompreneble, ke ŝi neniam renkontis viron, kiu per ŝia rideto ne forgesis siajn promesojn al aliaj.

Sed iun subitan tagon venis fremdulo al la kortego. Oni diris, ke li estas ambasadoro de la caro de Ruslando, kaj li estis distinge akceptita kaj dotita per pavilono por loĝado.

La famo, kiu, kiel oni scias, rapidas pli ol plej rapidaj ĉevaloj, jam antaŭe avertis, ke li estas granda virin-ĉarmanto. Neniu virino — juna aŭ neĵuna — kapablis lin rezisti, kvankam li neniel penis tiurilate.

— Lin mi emus vidi, diris la markizinetino, kaj baldaŭ ŝi vidis lin. Li estis granda malhela viro kun sovaĝa vizaĝo kaj tre ruĝaj lipoj — kaj li sciis rajdi kaj kanti tiel, ke neniu iam ajn memoris iun kompareblan.

— Li ne tro valoras, li eĉ ne estas galanta, diris la markizinetino faldante kaj malfaldante sian ventumilon plurfoje. Sed samtempe ŝia koro tremetis proprakonte — kaj sekvatage ŝi zorgis, ke ili denove estu kune.

Estis tute vere, ke li ne estis galanta. — kaj neniu el la damoj de la kortego povis prave diri, ke li amindumis al ili. Multaj tamen estus kapablaj raporti pri aliaj aferoj, ĉar ĝuste tiam la noktoj estis senlunaj, kaj la paviloneto situis tre oportune ĉe la palaco kaj tamen bone kaŝata inter boskoj.

Ofte oni povis aŭdi strangan, lamentan muzikon de tie — kaj ĝi baldaŭ iĝis plej granda modo inter la plej ĉarmaj kaj facil-moralaj junaj damoj.

— Estas skandale, diris la markizinetino kaj senpacience sin turnis antaŭ la spegulo, dum la ĉambristino laĉis ŝian korseton.

— Oni diras, ke li estas tre malfeliĉa pro enamiĝo al tre altranga damo, flustris la ĉambristino, ke tial li ludas tiel sovaĝe kaj sin amuzas tiel freneze.

— Al kiu do li enamiĝis? demandis la markizinetino, tiom rapide sin turnante, ke la ŝnuro rompiĝis.

Sed tion la ĉambristino ne povis rakonti. Ŝi sciis nenion.

La markizinetino iris sola la parkon kaj sin spegulis en la baseno. Kaj la akva spegulo denove reĵetis plej ravan bildon. Almenaŭ unu fojon ŝi sulkigis la frunton por profunde cerbumi — sed tiam ŝi ankaŭ ekhavis ideon. Rapide ŝi kuris hejmen, ŝlisis la pordeton de sia dormoĉambro kaj ekskribis letereton per ruze torditaj literoj kaj sen subskribo.

Mia sinjoro,

Sendu unu solan rozon al tiu virino, kiu el ĉiuj plej plaĉas al vi — kaj hodiaŭ nokte ŝi muzikos kun vi unu horon...

Tre saĝa kaj delikate elpensita plano ĝi ŝajnis al la markizinetino. Ĉar se li sendos al ŝi la rozon, ŝi scios lian sopiron, dum li restos en dubo tiom longe, kiom al ŝi plaĉas. Male, — kvankam nekredeble — se li sendus la rozon al alia, nu, tiam tiu ĉi tute ne komprenus la signifon. Ho, kiom perfekte rave: Ĉiuj atutoj en la mano kaj al la fremdulo neniu. Ŝia honoro restas neofendebla.

La tutan posttagmezon ŝi uzis por pretigi la leteron kaj sekrete ĝin ekspedi. Kaj antaŭ ol la aŭgusta suno malaperis ĉe la arte tonditaj heĝoj, la markizinetino tenis en sia mano longtrunketan, malhelan, ravodoran rozon.

Pri la kurioza muziko, kiun ŝi ekkonis tiun nokton, nur restas diri, ke ĝi multe plaĉis al ŝi. Verdire ŝi neniam konsciis, ke ŝi estas tiel muzikema kaj lernema. Unu horo iĝis multaj horoj, kaj konstante ŝin ensorĉis

L I N G V O

NEFERMITA LETERO al S-ro M. C. BUTLER

Tre Estimata Kolego,

Ĉu la legantoj de nia Revuo pardonos al mi denove elŝovi sur la kuirejan tablon la marserpenton IO kaj pretigi novan raguon el ĝiaj distranĉitaj pecoj — mi ne scias. Almenaŭ mi antaŭzorgis lasi kuri iom da tempo inter viaj artikoloj kaj mia respondo, por ke ili povu reakiri kelkan apetiton.

Ĉar respondon mi ĉiel ŝuldis al vi. Ne nur pro tio, ke mia loko en la redakta komitato donas al mi ian respondumon pri la sinteno de la Revuo, kaj estis sekve por mi dece, ke mi publike diru tiurilate mian tutan penson; sed ankaŭ pro tio, ke viaj vortoj vekis en mi multan eĥon; ke mi, kiel esperantisto kaj kiel akademiano, ne povas resti indiferenta pri via voĉo, alvokanta nin al lojala observado de la Fundamento kaj al paca konkordo inter samideanoj; ke, fine, tiun skismon, kiu danĝere rompas

la unuecon de la movado, mi sentas eĉ en mi mem, kaj mi suferas tiom da konscienciproĉoj, uzante la io-formojn, kiom da morala ĝenateco, uzante la formojn kun -ujo. Tial mi respekte petas vin kredi, ke la sekvantajn paĝojn mi skribis nur post longa pripenso, kaj kun profunda deziro ebligi ian solvon, se ne kontentigan por ĉiuj, almenaŭ ofendan por neniu.

*

Nekontesteble, la formo de la landnoma sufikso estas, se ne la sola, tamen la plej videbla punkto de malakordiĝo inter esperantistoj, kaj tiu, kiu plej akre interincitas la ĝisostajn fundamentistojn kaj... la aliajn. Oni povus kontraŭdiri, ke la subjunkcia signifo de DUM kaj ĜIS estas tute same enskribita en la Fundamento, kaj ke sekve la uzado (sistema!) de DUM KIAM aŭ ĜIS KIAM estas egale „tre danĝera kaj nelojala“; oni povus aldiri, ke la konstanta Zamenhofa tradicio donas al ATA kaj ITA tre difinan signifon, kaj ke sisteme uzi la unuan anstatatŭ la dua

estas egala atenco kontraŭ la spirito de nia lingvo.

Sed tio ne malhelpas, ke tiuj lastaj pecoj aspektas, en la okuloj de la plej konservativaj, nur bagatele, kompare kun la mortinda peko IO. Kaj tamen, oni povus apriore supozi la malon, ĉar la subjunkcioj aŭ la participoj estas esenca parto de la gramatiko, dum la landnomoj estas nur propraj nomoj, kaj, kiel tiaj, fremdaj kaj eksteraj al la sistemo de ĉia lingvo: pruvo de tio estas, inter alie, ke, tuj de kiam la politiko okazigas ŝanĝon de landnomo (kia: Irano anst. Persujo, ekz-e) aŭ kreon de nova nomo (kia: Benelukso, ekz-e), ĉiuj lingvoj registras tiun ŝanĝon aŭ kreadon, neniel intervenigante siajn akademiojn, petante konsilojn aŭ kontroilon de neniam lingvaj aŭtoritatoj ktp. De kie venis do tiu escepta graveco, tiu eksterordinara valoro agnoskata de la esperantistoj al tiu geografi-politika esprimilo? Tion povas klarigi al ni flugrigardo super nia historio.

*

novaj varioj de la stranga kaj sovaĝa melodio, kiun la fremdulo instruis al ŝi.

La sekvan matenon ŝi ne sonorigis por sia ĉokolado kiel kutime, sed dormis ĝis la suno alte staris sur la firmamento. Kaj se ŝia amikino, sinjorino de F., ne estus sin anoncinta por forir-vizito en la tagmezo, estus tre necerta la momento de ŝia vekigo. Sed ĉar sinjorino de F. samtage estis irona al Parizo por unu semajno, la ĉambristino enlasis ŝin en la dormoĉambron, kie ŝi tuj sidiĝis kaj ekbabilis.

Sed subite ŝi interrompis sin.

— Mia Dio — denove ruĝa rozo, ŝi kriis kaj fikse rigardis la belegan longtrunketan rozon, kiu nokte plene malfermiĝis. — Ĉu vi do scias, ke ĉie, kie mi ĉimatene estis, en pli ol dek lokoj (kaj ŝi parkerumis la nomojn de deko el la plej belaj junaj damoj de la kortego), ĉie mi trovis rozon apud ilia lito, unu solan rozon. Sed plej ridinde estas, ke

neniu scias, kiu ĝin sendis. Nu, bone, mi iom urĝiĝas, karulino, estu singarda, ĝis revido, ĝis revido...

En la vivo de ĉiu virino venas momento de l' unua atako de histerio. Tiu ĉi estis la momento por la markizineto. Sed nur granda verkisto aŭ psikologo havus ŝancon priskribi tian paroksismon en virina animo. Por fini sufiĉu la diroj de la ĉambristino al unu el la lakeoj:

— Ŝia moŝtino unue jetis al mi la rozon, kiu troviĝis sur la noktoblo, poste eĉ la vazon kun akvo cele al mia kapo. Kaj ĉu vi imagas, kion ŝi kriis? Ŝi kriis: Al la sterkejo tuj, kaj ne kuraĝu ĝin kaŝi aŭ uzi por ornamo ĉi-vespere. Sur la sterkejon, la sterkejon, ĉu vi komprenas? Kaj tiam ŝia moŝtino ekploregis. Kaj imagu, hieraŭ, kiam ŝia moŝtino ricevis la rozon, ŝi tiom feliĉiĝis. Kiel klarigi tion? Ĉu entute eblas kompreni?

El la dana: Poul Thorsen.

Ni ne scias, de kie Zamenhof elpensis la sufikson -uj. La plej verŝajna hipotezo, la plej konforma al tiamaĵ labormetodoj de Zamenhof estas, ke li tiris ĝin el la franca vorto „étui“, malkombinante tiun en du esperantaj sufiksojn: et-uj-o (= ujo por etaj aferoj). Ĉiuokaze, la unua signifo de -uj- estas vere tiu de kesto, vazo, entenilo ktp. kaj Zamenhof etendis ĝin poste al la signifoj de arbo kaj de lando nur el tiu deziro pri vort-ŝparemo, kiun li aludas en la Letero al Borovko. Tiu sekundara sencovastigo klarigas, probable, kial la sufikso posedas nur la unuan signifon, kiam uzata memstare („rusa ujo“ estas samovaro, aŭ io analoga, kaj tute ne la lando de l' rusoj!), kaj kial la du aliaj signifoj iafoje malbone kongruas kun la unua (ĉu KAFUJO estas lando, kie kreskas tiu produkto, arbo, ĝin naskas, aŭ vazo por ĝin kuire prepari?). Al tiuj signoj de nekohereco ni aldonu, ke komence Zamenhof uzis ĝin sisteme por ĉiuj lanĝoj, kio rezultigis strangaĵojn, kiaj „Holandujo, Palestinujo“ (1897), „Bolivujo, Flamandujo“ (1904) ktp. Ŝajnas, ke ekde sia naskiĝo, -uj- estis malbonŝanca...

Tiuj maloportunaĵoj estas eble la kaŭzo de apero de ĝia rivalo IO. Kiu estis ties patro, ne estas neeble diveni. Jen la faktoj, en la kronologia ordo:

Majo 1894.

En la vortaro de la „Dialekto“ proponita de Zamenhof al la ĝenerala voĉdono de la adeptoj („Esperantisto“, pĝ. 72.) oni legas: -i (= -uj). Oni scias, ke tiu reformo estis rifuzita de 157 voĉoj kontraŭ 107.

Aŭgusto 1905.

La Unua Kongreso sankcias la „Fundamenton de Esperanto“. El ties antaŭparolo mi citas: „Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon... Se ia aŭtoritata centra

institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas *tro neoportuna*, ... ĝi povos proponi formon *novan*, kiun ĝi rekomendos uzadi *paralele* kun la formo malnova, kiu fariĝos *arĥaismo*, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo...“

Tiu „aŭtoritata centra institucio“ estis kreita de la sama kongreso, sub la formo de „Lingva Komitato“.

Januaro 1906.

Zamenhof sendas al sia amiko Javal ĵus aperintan numeron de „Ruslanda Esperantisto“, en kiu li publikigis la „Dogmojn de Hilelismo“. La kvina dogmo finiĝas jene: „Se regno aŭ lando ne havas ankoraŭ neŭtralan nomon, mi devas ĉiam nomi (ilin) per nomo hilelista, kiu konsistas el la nomo de ilia ĉefa urbo kun la aldono de la finiĝo „regno“ por la tuta patrujo kaj „lando“ por la nomo de ĝia parto. Ekzemploj: ... Peterburgregno, Varsovilando.“ Li petas de Javal kritikojn kaj konsilojn.

Marto 1906.

Zamenhof publikigas en Sankta-Peterburgo broŝuron „Homaranismo“, kiu estas la korektita represo de „Dogmoj de Hilelismo“; inter la kelkaj ŝanĝoj, la 5a dogmo finiĝas jene: „... per nomo homarana, kiu konsistas el la nomo de ilia ĉefurbo kun la aldono de la finiĝo „io“ por la tuta patrujo kaj „lando“ por la nomo de ĝia parto. Ekzemploj: ... Peterburgio, Varsovilando“.

Novembro 1906.

Sekve de la diskutoj, kiujn Zamenhof havis en la Dua Kongreso (Aŭgusto, Ĝenevo) kun Javal kaj Lemaire, li sendas al Boirac, prezidanto de la Lingva Komitato, projekton pri „Neologismoj“, t. e. pri novaj formoj aŭ vortoj, kiuj, se oficialigitaj de la L. K., povos esti regule uzataj apud la fundamentaj formoj. Parto de tiu

projekto tekstas: „Sufikso de lando estas -i- anstataŭ -uj- (ekzemple: Anglio anstataŭ Anglujo); la nomoj de kreskaĵo estas farataj per la vortoj „arbo“ aŭ „planto“ anstataŭ la sufikso -uj- (ekzemple: „pom-arbo“, „rozoplanto“).“ — Tiun projekton, laŭ la peto de Boirac kaj aliaj, Zamenhof reprenis iom poste.

Decembro 1906.

S-ro Moch, komisiita de la Dua Kongreso prezenti antaŭ la Tria Kongreso raporton pri la „Propraj Nomoj“, presigas tiun raporton (poste represitan en la Oficiala Gazeto de la 25 Aŭgusto 1909). Tie oni legas (§ 24): „Mi proponas simpligon, konsistantan en la alprenado de nova sufikso -i- por anstataŭi -uj- en ĝia geografia signifo. Laŭvere tiu propono enkondukas ion novan... Sed mi havas seriozajn motivojn supoziti, ke ĝi estus aprobata de D-ro Zamenhof pro ĝia granda oportuneco.“

Aŭgusto 1907.

Post la diskutado en la Kembra Kongreso, s-ro Zakrzewski publikigas kontraŭraporton, kiu certe respegulas la diverĝajn opiniojn esprimitajn de la ĉeestantoj. Kritikinte la transskriban sistemon de s-ro Moch, li aldonas: „La plimulto (el la aliaj proponoj) ŝajnas al mi aprobinda, kiel: la anstataŭigo de la finiĝo -ujo per -io.“

Decembro 1907.

Esperante eviti skismon inter la Delegacio kaj la esperantistaro, Zamenhof redaktas „Tria Cirkuleran Leteron al la L. K.“, kiu entenas nur parton de la „neologismoj“ proponitaj de li en 1906. Tamen la 6a punkto plu tekstas: „Por nomoj de landoj, oni povas uzi sufikson -i- anstataŭ -uj-.“

Oni scias, ke la 18. Januaro 1908 la intertraktadoj rompiĝis, kaj la Tria Cirkulera Letero ne estis komunikita al la L. K.

Aŭgusto 1909.

Boirac konigas al la Sesa Kongreso (Barcelono), ke la Akademio, konsultita pri reformoj en la lingvo, ilin unu-bloke forigis, kaj interalie „esprimis la opinion, ke ne estus bone konsili la uzadon de novaj sufiksoj en la komuna lingvo.“ Temis precipe pri la teknikaj sufiksoj -if-, -iz-, -oz- ktp., sed ankaŭ evidente pri -i-.

Marto 1911.

„Lingva Respondo“ de Zamenhof, pri la nomoj de landoj. Ĝin oni sufiĉe konas („Lingvaj Respondoj“ 3, pĝ 41—42). Mi notos nur: 1^o ke Zamenhof intertempe konstruis sistemon de nomado koheran, sed apogitan sur politika postulato („lando apartenas al unu gento“); 2^o ke la eventualo de ŝanĝo ne estas nepre esceptita („se la Akademio trovus necesa anstataŭigi en ili la „uj“ per „i“, mi tion ne malkonsilas“... „mi konsilas nur en tia okazo, se nia L. K. tion postulus“).

Junio 1921.

Cart, prezidanto de la L. K., ricevas petskribon de 5 L. K.-anoj, petantaj la enkondukon de -i-. Tial li do komisias al la Direktoro de la Sekcio pri la Komuna Vortaro, Grosjean-Maupin, „la pezan taskon verki pri tiu ĉi demando raporton pure objektivan, science meto-dan kaj pruve plenan“ (Cart). La raporto, plene responda al tiu postulo, finiĝas jene: „Mi konfesas, ke, komencante tiun ĉi esploron sen ia antaŭjuĝo, mi sincere esperis, ke mi povos proponi precizan solvon de la problemo. Sed, esplorinte metode kaj detale la demandon, kolektinte kaj komparinte la landnomajn radikojn en la ĉefaj eŭropaj lingvoj, kunmetinte proksimume plenan liston da akceptindaj esperantaj landnomaj radikoj elektitaj laŭ la principo de internacieco, tiel ĝuste klarigita de s-ro Rollet de L'Isle, prove aplikinte ĉiun el la ses eblaj solvoj al ĉiu tiu radiko aparte, mi estas devigata konclu-

di, ke *nenia solvo* estas plene kontentiga, nek absolute kaj nediskuteble preferinda super la aliaj... Nur la ĝenerala praktika uzado povos definitive decidi pri la afero, unue elektante inter la diversaj sistemoj tiujn, kiuj prezentas pli da bonaĵoj kaj malpli da malbonaĵoj kaj esceptoj, ol la aliaj, kiuj estos kredeble iom post iom forĵetataj.

La Lingvaj Institucioj siaflanke devos plenumi gravan rolon, zorgante, ke oni ne malatentu la konsilojn de Zamenhof, ke oni respektu la spiriton de la lingvo kaj precipe, ke oni konservu ĝian elastecon kaj flekseblecon... Oni tro facile parolas pri danĝera ĥaoso en multaj okazoj, kiam temas nur pri libereco kaj facileco, kiu, dum ĝi ne malhelpas la kompreneblecon kaj la klarecon, estas tute sendanĝera...“

Februaro 1922.

Preteratente la atendemajn konkludojn de tiu raporto, la Lingva Komitato „malkonsilas“ la uzon de la sufikso -i- per 74 voĉoj kontraŭ 5, kaj Cart konkludas sian raporton: „Mi firme esperas, ke ĉiuj esperantistoj... restos simple fidelaĵoj al la Fundamento kaj al la Zamenhofa kaj tradicia uzado, *ne enkondukante novan sufikson*.“ La L. K., kiu, laŭ tiu Fundamento, havis la rajton enkonduki ĝin, efektive tion rifuzis fari.

El ĉi tiu rapida resumo oni povas rimarki, ke la donitaĵoj de la problemo tre ŝanĝiĝis kun la tempo: ĝis la Ido-krizo, neniu protestis, eĉ ne unu voĉo laŭiĝis kontraŭ la enkonduko de la sufikso -i-, sub la sola kondiĉo, ke la L. K. ĝin akceptu; ekde la Ido-krizo, ĝi estis ne nur intermiksita en la amaso de la novaj sufiksoj elpensitaj de Couturat, sed eĉ ĝi rapide fariĝis la tipo mem de la Couturat-Beaufrontaĵoj malgrau sia Zamenhofa origino. La kristaliĝo de la kontraŭidismo super tiu malfeliĉa vokalo

estas kurioza fenomeno, kiu klare komprenigas la decidon de la L. K. en 1922: Grosjean-Maupin estis juĝinta pri la demando kun scienca objektiveco kaj prudenta singardemo; la L. K.-anoj prijuĝis ĝin kun pasia ailigiteco al la Zamenhofa idealo kaj tute prava timo antaŭ la danĝeriga Idopropagando. Oni devas efektive memori, ke en 1922 Ido estis ankoraŭ potenca malamiko, ke la movado komencis nur releviĝi el la ruinoj de kvarjara mondmilito, kaj ke en tiu kriza tempo la plej granda unueco kaj tradiciemo estis nepre necesaj.

Sed de tiu epoko la cirkonstancoj multe evoluis. La morto de Ido donis la plej brilan pravigon al nia taktiko de stabileco kaj kontinueco; la florado de la novgeneraciaj esperantistoj, kutimiĝintaj, ekde sia esperanta naskiĝo, rigardi nian lingvon kiel *fakton*, ne kiel *provon*, definitive forflugigis el niaj vicoj la tentadon pri plibonigoj, reformoj kaj aliaj kimeroj; la konstanta publikigado de riĉa, densa, seriozema literaturo konsistigis la plej fortikan barilon kontraŭ la personaj kapricoj kaj individuaj utopioj, kiuj tiom ĝenis la 25 unuajn jarojn de la movado; la meza nivelo de la lingvo estas senkompare pli alta, ol tiu de la jaroj 1900—1914. La afekciaj motivoj, kiuj diktis la decidon de 1922, iom post iom malaperis, kaj espereble oni povas nun konsideri la demandon per malvarmaj okuloj.

Sed ĝuste, vi probable kontraŭdiros, se la granda plimulto de la esperantistoj estas tiel saĝe konservativa, tiel fidinda en sia ortodoksio, kiel vi ilin pentras al ni, kial do okazas, ke ili obstinas en la uzado de malkonsilata sufikso, aŭ, pli ĝuste, en la forpuŝado de fundamenta sufikso? Kaj vi tute pravas. Tio estas alia interesa fenomeno, kiun ni devas nun esplori.

(Fino sekpos)
G. Waringhien

PÁL VARSÁNYI

Elstara okazaĵo de la hungara arta vivo estis la grafika ekspozicio de Pál Varsányi; ĝi vekis ĝeneralan intereson en ĉiuj sociaj tavoloj. Tion montris ankaŭ la sinteno de la gazetaro: la gazetoj de ĉiuj partioj dediĉis unuaniman honoron al la artisto kiu en la plej nigraj jaroj de la pasinta faŝista reĝimo stariĝis al la afero de la homa progreso.

Tiu sukceso estas speciala ĝojo por ni, ĉar ĝin rikoltis artisto, kiu estas malnova, entuziasma membro de la esperantista familio. Paŭlo Varsányi nome estis la arta kunlaboranto de L. M. en ties unua periodo: li gvidis en ĝi la konstantan rubrikon „Arto kaj Artistoj“. Kaj tial, kvankam ni ordinare ne publikigas ilustraĵojn, nun ni ne povis kontraŭstari al la tento, ke ni presigu kelkajn el la belaj pecoj de nia iama L. M.-familiano.

Pál Varsányi havis siajn unuajn sukcesojn eksterlande, per siaj artverkoj elsenditaj dum la faŝismaj jaroj. La „Berner Tagwacht“ en 1935 publikigis pri li artikolon sub la titolo „Artisto de revolucio“, kaj presigis lian bildon „Faŝismo“. Ĉi tiu bildo, kiel ankaŭ la gravuraĵo „Hokkruco“ estas el lia antifaŝista serio, eksterleĝe devastigita. La serio kun profeta forto figuras, kio sekvis poste: la amasiĝon de teruraĵoj. La svisa socialista partio uzis lian lignogravuraĵon „Senlaboruloj“ en la balotbatalo de 1935. La „Aufstieg“ en Bern konigis lin sub la titolo „Artisto de nia tempo“. En 1946 en Sovjetunio li ricevis bonan kritikon pri sia gravur-serio: „Gulliver en Kapitalio“. Alte lin honoris Romain Rolland, esprimante al li sian gratulon pri la „sobra kaj intensa sincereco grandlinieco kaj vera proleta spirito“ de liaj verkoj, kaj sendante al li sian foton kun la

dediĉo: „Al la granda artisto de la popolo kun frata simpatio“.

Dum la milito, kune kun la aliaj persekutatoj, ankaŭ lin oni metis en unun el tiuj misfamigintaj laborservaj kompanioj, kiujn rajte oni nomis moviĝantaj ekzekutejoj. Nur hazarde li povis sin savi kaj reveni post la liberiĝo en la prirabitan hejmon.

Eklaborinte, de tiam li havis jam eksterlandajn sukcesojn („Front“ en Bruxelles, 1947; „Konst och Kultur“ en Stockholm), kaj nun fine li povis fari sian memstaran ekspozicion.

Pál Varsányi estas vera artisto de la nigro kaj blanko. Li majstras la teknikon de la gravurarto, sugeste kaj kun granda forto li povas movi la grandajn surfacojn. Sed trans tiu metia scio, en lia arto parolas al ni amaro kaj moko, nobla patoso, trankvila eduko, pasia agito; ĝi spegulas la pasian serĉadon de belo, vero, bono kaj justo. La multedira simpla de lia realismo faras ofte vere animkatenantan efekton. Sincera kaj dura estas lia sinteno: senkompromisa batalo kontraŭ la faŝismo kaj ĉia speco de subpremo kaj ekspuato. Ekde la liberiĝo li estas eminenta prezentanto de la konstrua laboro. Certege li havas multe por diri ankoraŭ por la laborantaj amasoj.

Pedagogia epopeo.

La aŭtoro de la supre titolita romano, A. Makarenko mortis en 1939. Kiam la radio disflugigis la malĝojan sciigon, el ĉiu angulo de Sovjetio radiodepeŝoj venis al la Asocio de la Sovjetaj Verkistoj. Tiuj ŝi depeŝoj pestis prokrasti la tempopunkton de la enterigo. Ankaŭ la depeŝintoj volis partopreni la funebran ceremonion. Kaj la sekvan, la postsekvan, la trian tagon vagonare, aŭte, ŝipe, flugmaŝine alvenis la funebranta publiko: el Murmansk kaj el Kamĉatka, de apud la Volga, el sub Moskvo, elinter la neĝaj montaroj de Pamir, el la Siberiaj praarbaroj kaj el la ŝipoj de la Pacifiko, oficiroj, maristoj, pelt-

ĉasistoj kaj kamparanoj, faklaboristoj kaj la mezlernejaj profesoroj, librotenistoj kaj kuracistoj, viroj kaj virinoj svarmis al Moskvo, por la enterigo de Makarenko, de tiu ĉi homo, kiu vivis tiel mirindan vivon. Kaj kiam la iamaj disĉiploj jam metis en urnon la cindrojn de la iama Instruisto, ĉirkaŭ kvindekope ili akompanis la vidvinon en ŝian loĝejon. Kaj ŝi komencis distribui memoraĵojn inter la gastoj. Al unu ŝi donis cigaredujon de la mortinto, al alia uzbekan gobelenan kapkovrilon, al la tria, al la deka, al la trideka libron, horloĝon, poŝfajrilon k. t. p. Sur la skribotablo staris granda ferkesteto.

— Malnovaj skribaĵoj... Dokumentoj... — diris la vidvino.

— Ni malfermu, eble ili koncernas nin — diris la gastoj.

Sed la vidvino ne trovis la ŝlosilon. Ŝi vane traserĉis la tutan loĝejon. La iamaj disĉiploj malĝoje kaj senkonsile rigardadis la ŝtalan keston. Fine iu el ili ekhavis savan ideon.

— Venu do — li diris al unu el ili. — Malfermu ĝin perforte. Tio ja estis via fako...

La ceteraj rigardis al larĝŝultra, proksimume tridekkvinjara viro. Tiuj, kiuj estis el la „sama jaro“, komencis ridi. Nu jes, trifoje refalinta kasboristo estis la alparolito... Oni vastigis la lokon apud la tablo... La „fakulo“ komencis labori. Dum du horoj li eksperimentadis pri la kesto. La aliaj ridis, instigis, donis konsilojn, sed vane... el la fingroj de la iama rompŝtelisto jam forflugis la scienco... Kaj inter la iamaj kunkulpuloj neniu troviĝis, kiu povus helpi al li...

Tiu ĉi libro temas pri tiuj kvindek vizitantoj kaj pri la infanaĝo de ankoraŭ kelkcent aliaj sovjetaj civitanoj. Mi povus diri ankaŭ tion, ke la duvoluma raporto priskribas la vivon de ŝtate subtenata novtipa eksperimenta lernejo, la vivon de memprizorga kolonio, kie la morale difektitajn infanojn spite al multaj malfacilaĵoj,

refaloj, burokrataj intervenoj, spite al la mallarĝvida, malama kaj egoista sintenado de la ĉirkaŭaĵo — oni edukas je honestaj homoj.

Kiuj en la romano serĉas kaj kontrolas la vojon de la ĉefheroo, tiuj ĵuras, ke la libro de Makarenko havas severan konstruon, kaj ke ĝi estas pure beletra verko: vera romano. La ĉefheroo de la romano verkita en la unua persono estas mem la verkisto, kiu preskaŭ el la nenio kreis tiun infankolonion.

Ĉe la naskiĝo de la kolonio la interna milito ankoraŭ furiozis en la lando, eĉ, apenaŭ cent kilometrojn de la kolonio, en la tempo de ĝia naskiĝo, kontraŭ-revolucia bando rabadis kaj bruligadis... Makarenko apenaŭ havis kunlaborantojn. Tiuj, kiujn li havis, estis diletantoj — en la praktike kaj teorie pedagogia senco de la vorto... Ankaŭ Makarenko estis diletanto. Kaj la unuaj infanoj, la loĝantoj de la kolonio estis etaj, senbridaj banditoj, kiuj, vere ne nur ŝteladis la havaĵon de la malriĉa kolonio, sed ankaŭ endanĝerigis la sekurecon de la ĉirkaŭaĵo. Jes, eĉ atencojn ili faris kontraŭ la instruistoj mem... Kaj tamen, inter la terure malfacilaj cirkonstancoj kune frostante, same en ĉifonoj, kune malsatante kun la disĉiploj, Makarenko bridis la banditism-on de la junuloj, ne lastvice per tio, ke kune kun ili li estis en la mizero, kune kun ili li laboris por la certigo de la minimumaj ĉiutagaj vivkondiĉoj.

Ĝuste tiu ĉi malegoismo kaj memofero, la persona ekzemplo-dono efikis je tiuj malmildaj etaj sovaĝuloj elĵetitaj el la socio. La morala grandio, kiu el la Instruisto inundis al ili, pli efikis ol ajna discipliniga eksperimento. Eĉ: nur tio efikis. Emocia estas la sceno, kiam Makarenko, perdante la esperon pro la sensukceso, kun memmurda intenco turnas kontraŭ si mem la revolveron, kaj la infanoj: dekdu- dekkvin- deksep-jaraj — atakas lin, elsiras el lia mano la armilon kaj prom-

esas pliboniĝon — senvorte, nur en iliaj okuloj ardas la promeso.

Tiu ĉi romano per siaj streĉaj, turno-riĉaj ekscitiĝoj, per la disvolvo de la vivo, de la evoluo de ĝiaj pli ol cent herooj, per la senĉesa kunpuŝiĝo de la mond-konceptoj estas la praktika kaj teoria lernolibro de la eksterordinare malfacila problemo de la sovjeta vivo — de la eduko.

Dek- kaj dekmiloj da infanoj perdis sian patron kaj patrinon en la unua mondmilito kaj la ĝin sekvinta milito. Centojn da vilaĝoj kaj urboj detruis la kontraŭrevoluciaj bandoj. Sur la kampoj, kiuj iĝis batalejoj, kompreneble detruigis la produktiloj kaj la agroj restis nekulturitaj. La senhejmaj infanoj, por la vintro, kiel la migrantaj birdoj, vagis suden, en Mezan Azion, kaŝiĝante en holdoj, sur bufroj de vagonoj aŭ sur vagonsuproj, kaj por la somero ili revenis en la eŭropajn grandurbojn de Sovjetio. La juna sovjeta ŝtato, terure turmentita per la detruoj de la milito kaj de la civila milito, en la unuaj jaroj ne havis lernejojn nek prizorgajn koloniojn, nek pedagogojn por tio, ke ĝi sukcese solvu tiun gravan problemon, — la humanan ĉesigon de la infana banditismo.

Sed samtempe kun la finiĝo de la civila milito, kun la restarigo de la detruita ekonomia vivo, oni ekiris al la solvo de la gravaj demandoj de la infan-eduko. La elcerbumaĵoj de la edukaj sistemoj, kiujn ĝis nun oni kredis validaj, pruvigis senutilaj: ĉar antaŭ la okuloj de iliaj aŭtoroj ŝvebis la burĝa vivo kaj ŝtatformo. La infanon de la nova ŝtato oni devis prepari al nova vivformo, — sed, kiu lin preparis: la instruisto, la profesoro, la gepatroj, la prizorgantino mem estis edukitoj de la malnovaj lernejo, moralo, socia rigardo kaj antaŭ ĉio edukitoj de la malnova eduksistemo, kiu konstruiĝis je la bazo de la aŭtoritato, de la potenco. Mal-

facile, tre malfacile estis vekti je vivo la novan lernejon.

Unu el la grandaj fortoj de la sovjeta vivo estas —, se ĝi rimarkas, ke ĝia komencita eksperimento kondukas al malĝustaj, malutilaj vojoj, memkritike ĝi returnas sin, kaj rekomencas sian penadon profitante la spertojn de la eraro. Ankaŭ la sovjeta pedagogio faris erarojn, ekscesojn, miskaptojn sed ĝuste per ties rekono kaj senindulga malkovro ĝi evoluis. Kompreneble ĝi utiligis ankaŭ la adapteblajn rezultojn de la tutmonde konataj kaj rekonataj eduk-sistemoj.

La „Pedagogia Epopeo“ krom tio, ke ĝi estas kolekto de edifaj pedagogiaj travivaĵoj kaj analitika priskribo de multegaj figuroj de grandmezura romano — estas ankaŭ agrabla, facila kaj ofte amuza raporto pri la stultaj, malbonvolaj, obstinaj pedagogoj, burokratoj. Ĝia aŭtoro, A. Makarenko subite iĝis unu el la plej legataj kaj plej popularaj verkistoj de Sovjetio.

Ni publikas el la libro du epizodojn pri du knabojn-ŝtelistoj. La unua, Semjon, ŝajne neplibonigebla, memvole forlasis la edukejon; li nun reveuas nostalgie. La afero de Ujikov ne bezonas komenton. L. Sk.

Amber.

„Forever Amber“, la romano de Kathleen Winsor, estas vera furorlibro: ĝi aperis ĝis nun en 16 lingvoj, en ok milionoj da ekzempleroj. Tamen, ĝi ne estas el la tute aĉaj „bestseller“. Ĝian enhavon oni povas nomi interesa; ĝia sociala observmaniero estas multe pli simpatia, ol tiu de Francis Morgan, Deeping aŭ Vicki Baum; ĝia stilaro, eĉ se ne mondoskua, tamen almenaŭ estas senriproĉa. Ĉi havas proksimume la nivelon de la „Foblovis ĝin la vento“ de Margaret Mitchell.

Kaj, same kiel tiu ĉi, ankaŭ Amber estas historia romano.

Ĝis proksimume la tridekaj jaroj, la historia romano estis rigardata kiel „akademia“.

enuiga. Sed de tiam ege kreskis pri ĝi la interesiĝo. La motivojn de tio oni povas trovi en pluraj aferoj: en la modo de la spirit-historio; en la Freud-a, kaj eĉ plie Jung-a serĉado pri la praaj radikoj de la homa estado; en la psikologio de la ekzistismo, klariganta la homon ekskluzive el ties propra ekzisto, kaj fine en la ĝeneraliĝintaj mistikaj inklinoj. La komunajn radikojn de ĉio ĉi kompreneble oni povas facile trovi en la grundo de la diseriganta kapitalismo. La ĝenerala „mondsento“ estas la instinkto de la forturniĝo kaj rifuĝo. La homo turnas sin for de la mondo, en kiu li ne fartas bone. La brutala monĉaso, la ĉio-traŝpina reto de la kapital-intereso la homon fortimigas de tiu ĉi mondo, kiun — eĉ se li mem ne suferas senpere pro la ekspluatado — li sentas ege proza. Kaj, kiel kontrasto, ve-kiĝas en li la intereso pri la paseo kiun li sentas „heroa“, „poesia“. Li sentas la historion grada malproksimiĝo disde la prafontoj de la homa ekzisto. Kaj tial la kelkaj utopiaj romanoj montras la futuron eĉ pli proza, pli aĉa ol la nuntempo; ili montras ĝin kiel apenaŭ el-teneblan, falansteran mondon. Male, ju pli profunden oni reiras en la historio, des pli riĉan, koloran, profundsencan mondon oni kredas malkovri: la oran epokon, la „insulon de la feliĉuloj“. Krome, la literaturo kaj la arto pretendas kontentigi la postulojn de la elektitoj, pli altaj spiritoj, loĝantoj de la „insulo de feliĉuloj“. Kompreneble, tiu „elektiteco“ estas difinebla tre vaste. La magiaj-kontraŭintelektaj verkoj de John Cower Powys, kiuj nin portas en la orepokan mondhumoron de ia praa sensemo, vere respondas al la esoteraj, strangaj kaj iom taŭzigitaj postuloj de malvasta elita publiko; la Jozef-tetralogio de Thomas Mann jam parolas al ĉiu homo staranta sur la nivelo de la alta eŭropa kulturo; la verkoj de Margaret Mitchell, Kathleen Winsor, aŭ la germanaj Atlantis-romanoj,

siavice, apartenas al la tuta mondpopolo, leganta kiĉ- aŭ furorlibrojn La „insulo de feliĉuloj“ iĝis modo kaj forglutis la oceanon.

La romano de Amber okazas en du ebenoj: la unu estas la mirinda vivo de la granda kurtizano Amber, la alia estas la ege movriĉa historia fono. Ĉi lasta ebena, la historia, estas same grava, kiel la erotika. La okazaĵoj disvolviĝas en Anglujo, en la reĝa kortego, sur la stratoj de Londono kaj en la grand-urba submondo. Al tiu ĉi nigra bildo, nur kiel pala kontrasto aliĝas la idilio de la puranima angla vilaĝo, kaj la malproksima, entreprenema kapitalismo de Ameriko. Tiu malproksima mondo certe estas pli freŝa ol la sufoka atmosfero de Londono, sed, esence, ankaŭ tie troviĝas cinika ekspluatado kaj laŭleĝa kaperado, daŭriganta la hejman feŭdalan ekspluatadon per pli modernaj rimedoj. Tiun kaperadon oni komprenu laŭvorte. La ĉefa virheroo de la romano, Bruce Carlton, la eterna, korpoproksima kaj tamen romantike malproksima aristokrata amato de Amber, fariĝas el naŭziĝinta angla lordo samtempe mara pirato registare koncesiita kaj amerika plantej-posedanto ekspluatanta siajn sklavojn. Amber vidas sian idealon en tiu trankvila, superema kaj grandskale entreprenema viro. Post li, pleje kontentigas ŝian pretendon pri vir-idealo — la nigra Jack, la rajdanta bandito, kun kiu ŝi konatiĝas en la Newgate-a karcero. Ankaŭ Jack estas kuraĝa, superema, trankvila kaj vireca kiel Bruce. Ankaŭ Jack estas, en sia maniero, opozicia al la socio de sia epoko, kiel la lordo serĉanta novajn eblojn de vivo en Ameriko. La Ameriko de Jack estas la rabado.

Ni havas nian opinion pri la socio de Londono konklude el tio, kion ni spertas en la reĝa kortego, sur la strato, en la Newgate-a karcero. Sed en la romano la kritikon faras la pirato, la rabisto kaj la kurti-

zono. Kaj — ni ne forgesu — ĉi tio estas la kritiko de la kapitalismo pri la feŭdalismo. La persono de la kritikantoj mem estas kritiko pri tiu kritiko.

La bildo, kiun la furorlibro prezentas pri la angla socio de la 17. centjaro estas tre kolora, sed tre surfaca. La Londona kortego estas tia sama, kia estis ĉiu malmorala kortego de la mondliteraturo, ekde Babilono ĝis Napoleono III. Nenia aludo pri la historio vera. Pri la brua mizero de la Londona popolo ni ricevas ne senefektajn bildojn, sed nenion pri la sociaj kaŭzoj de tiu mizero. La karcero de Newgate vive projekciĝas antaŭ nin, sed sen la fleksiĝema kaj tamen ĝisprofunda Dickens-a realismo. La Londona submondo prezentigas laŭ la ŝablonoj de la grandurbaj sekretoj de l' 19. jarcento. La publiko de la furorlibroj amas la vojojn iritajn. „Post ĉirkaŭ unu semajno, granda ekscitiĝo estis en Newgate. Revolucio eksplodis en la urbo, religia grupo akiris al si la potencon kaj tri tagojn kaj noktojn ili iris la stratojn, postulis la regnon de Kristo, sed dume ili mortpafis ĉiun, kiu kuraĝis kontraŭstari al ili... Sed la ribelintojn oni venkis kaj mortigis aŭ kaptis ĉiujn. En kelkaj tagoj dudek homojn oni pendigis, aliaj estis kvaronumitaj aŭ radumitaj. Iliajn restaĵojn oni portis al Newgate, kaj tie brakoj, kruroj, trunkoj kuŝis en la korto, dum la ekzekutisto, esquire Dun, ege laboris en la kuirejo: li kuiris kaj preparis la kapojn en spica, sala suko, por ke ili ne putriĝu sur la paliso. En la karcero ĉio revenis en la kutiman staton, la kaptitoj plu drinkis kaj kartludis, priŝtelis sin reciproke kaj interbatadis.“ Jen epizodo de la grandaj revolucioj transformantaj la feŭdalismon en kapitalismon — el perspektivo de rano, pli precize: el la perspektivo de la karcerloĝantoj de Newgate, ankoraŭ pli precize: el la perspektivo de furorlibro. Ni ekscias, per kio oni preparis la detranĉitajn kapojn, sed ni

ne ekscias, kial okazis la revolucio.

Nun ni vidu la alian „ebenon“, la erotikon. Nu ankaŭ ĉi tiu diferencas de la mistera, vegetativa pravoluptemo de Powys au Lawrence, kaj diferencas ankaŭ de la Wedekind-a erotiko, kiu estas de kulturrevolucia speco, konscie detruadante la burĝan socion. Ĉe Kathleen Winsor ankaŭ la erotiko estas furorlibra erotiko surfaca kaj prefere dekoriva, rafinita, artefarita. El la dense alternantaj amoj de Amber certe plej individuata estas la antipatia Luke Chanel, kiu edzinigas Amber-on, por doni nomon al ŝia infano naskigota de Bruce, sed kiu poste fuĝas, zorge prirabante sian edzinon. Ŝiaj ceteraj edzoj kaj amantoj — senhelpaj junaj studentoj, grandsinjoraj nenifaruloj, nigraj sed delikatparolaj korteganoj, riĉa, maljuna, puritana burĝo — ĉiuj ŝajnas eltranĉitaj el ilustritaj aldonoj de la angla historio de 17-a jarcento. Ŝia erotika rilato al ili, malgraŭ la ŝajna liberparolemo, estas komplete nenidira. Ĉie la kolora kaj nenidira alterno de amo kaj disiĝo, pompo kaj misero, vesto kaj senvesteco.

La furorlibro de Kathleen Winsor do estas efektiva furorlibro. La modan interesigon ĝi volas kontentigi per la revivigo de la pasinto kaj per la erotiko. Ĉi lasta ja estas same speco de romantika opono al la nuntempo. Ĉar la erotiko ĉiam — de Pawys, Lawrence, Wedekind ĝis Winsor — volas kontraŭmeti al la evoluanta homo la praan, eternan, senŝanĝan, animalan homon. Ĝi volas pruvi, ke tio kion ni konas hodiaŭ kiel unun el la plej gravaj homaj impulsoj, ekzistis jam ankaŭ en la paseo, eĉ pli intense, vere, sincere; eventuale: ĝi estis vera nur en la paseo. En tiu ĉi punkto la maldensa furorlibra homobservo de Winsor kongruas al la iktiosaŭro-memo de Powys, al ĉi tiu prautopio vegetanta en mistikaj profundoj. En la paseo la homo estis pli homa ol nun; la evoluo propre estas regreso;

ĉiu epoko de la homa historio estas des pli altranga, ju pli proksima ĝi estas al la feliĉa, idilia besteco de la „praa orepoko“. Kaj timaniere fariĝas reakciaj la verkoj el la speco de Winsor — ne pro konscia intenco, sed pro instinkta sinteno. La kompatinda Winsor ja certe eldiris tre multe pri la prezentita epoko kaj pri la tiama subpremado. Kaj sub tio ni povas senti la ĉiaman subpremon, ankaŭ la nunan, kaj povus ĝin akcepti kiel bonintencan, humanistan socio-kritikon. Sed la finfina motivo, kiu ŝin turnis al la prezento de la paseo, tamen estis: kontentigi la leganton, kiu volas forturniĝi de la nuno, per la bildoj mensogaj de mondo, kiun oni opinias pli voluptema, pli riĉa, pli kolora, pri romantika ol la nuna. La romano de Winsor, kaj la kolora, sed tamen meza figuro de Amber klare pravas, ke la romantika revivigo de la paseo, tiel same kiel la erotiko, estas nenio alia ol nebuligo de la veraj problemoj. La furorlibro estas la „tria vojo“ en la literaturo. (i. k.)

Revolucio de artistoj.

La tri kariatidoj de la moderna pentroarto estas: Cézanne, van Gogh kaj Gauguin. Tri pentristoj, tri revolucioj. Ĉiuj tri estas senkunulaj, forlasitaj kaj orfosolaj. Ĉiuj tri ekiris el la revolucio de l' impresistoj, sed ĉiuj tri ankaŭ supere transpasis tiun ŝtupon. Neniu el ili fondis skolon, tamen sur ĉiuj tri oni postfundamentis skolon: la postimpresismon, la fovismon kaj la kubismon. Pri ĉiuj tri oni jam verkis cent kaj cent librojn, ankaŭ sennombrajn studojn. Ilia vivo estas vere kompleta romano. Tiel malfacile estas pri ili mallonge rakonti, kiel la spiritoromanon de Cézanne verkis pleje lia plej bona amiko kaj plej granda kontraŭulo: Zola, en la libro „La verko“. La „Tragika vivo de van Gogh“ antaŭ nelonge aperis en Parizo kaj Bruselo. Kaj Gauguin-on modlis

Somerset Maugham en sia verko „La sprono de l' diablo“.

Cézanne (1839—1906) luktis dum duonjarcento tial, ke oni eksponu liajn bildoverkojn en la Salono. Kelkfoje li ekspozis ĉe l' impresistoj, sed la publiko kaj kritiko tiel furioze atakis liajn bildojn, ke fine ankaŭ ili deturniĝis. Ankaŭ Zola, lia granda amiko, fariĝis lia kontraŭulo. Por kiuj pentris Cézanne? Tute ne por siaj epokkunuloj, kiuj eĉ ne intencis lin kaj liajn verkojn kritiki kaj pridiskuti. Tiu ĉi majstro mortis tiel forlasite, kiel Rembrandt aŭ Mozart. Tute foriĝinte de la mondo kaj de Parizo — kin urbo signifis por li la tutan mondon — li laboris en la malgranda, sudprovinca Arles, ĝis li kapablis sin movi. En iu oktobra pluva tago li pentris ekstere dum multaj horoj, ĝis li svenis. La kolektoveturilo de lavinstituto lin trovis kaj portis hejmen al lia maljuna mastrino. Tiu ĉi konsternite proksimiĝis al li kaj ekvidinte lin pluvmalseka kaj sveninta, volante lin malvesti, memoris, ke li neniam toleris dum malsano, ke oni lin tuŝu. Sed la maljunulino tamen kuraĝiĝis kaj komencis lin flegi. Cézanne malfermis la okulojn kaj ne protestis. „Ho, Dio“ — veis la virino — „li nenion diras. Tio signifas, ke li mortas.“ Saĝulaj vortoj, ili egalvaloras volumegon da biografio. Cézanne vidis en sia vivo la bildodetruantan furiozon de Parizo kaj li neniam ĉesis protestadi kaj spiti, — sed la maljuna Cézanne, la mortanta mizerulo jam ne plu protestis.

Sekvatage li rekonsciĝis kaj iris la ĝardenon por daŭrigi sian bildon pri kamparano. Li remalsaniĝis. Oni lin enlitis kaj li neniam plu leviĝis. Post ne multa tempo la verkista artaĵkomercisto Vollard el Parizo aperis en Arles por viziti pentriston Cézanne kaj la tuta urbeto konsterniĝis, ke estas iu, kiu pagis mil frankojn por la nevenditaj bildoj de la ekstravaganca pentristo.

J. Cs.
(Finote)

NIAJ REPRESENTANTOJ

- AFRIKO:** Afrika Revuo, Maroko, *Casablanca*, 5 rue Savorgnan de Brazza.
- AUSTRALIO:** F. V. Taylor, *Albury*, N. S. W. 653 Jones Street.
- AUSTRIO:** Librovendejo „Tramondo”, *Wien*, I., Neutorgasse 9.
- BELGUJO:** Flandra Esperanto Instituto, *Brusel*—West, Pieter van Humbeckstr. 3.
Belga Esperanto Instituto, *Antwerpen*, 127 Lange Leemstraat.
- BRITUJO:** Universala Esperanto Asocio, Heronsgate, *Rickmansworth*.
- BULGARIO:** Internacia Kulturo, *Softo*, str. Alabin 33.
- ĈEHOSLOVAKIO:** „Revuo Esperantista”, *Praha*, Uralské nám 9.
- DANUJO:** Libro-Servo de CDEL, *Kopenhago*, Pr. Jorgensgade 4 A.
- FINNLANDO:** Vilho Setälä, *Helsinki*, Onnentie 23.
- FRANCIO:** Unuiĝo Esperantista por Francio, *Paris*, 10 c. 34 rue Chabrol.
- HUNGARIO:** Béla Bercei, *Budapest*, VIII., Rökk Szilárd-str. 28. Poŝtekkonto nro. 4014.
- ITALUJO:** Luigi Minnaja, *Roma*, Viale Giulio Cesare 223.
- JUGOSLAVIO:** Slovenia Esperanto Ligo, *Ljubljana*, Cankerjevo Nabrazje 7/1.
- KROATIA** Esperanto Ligo *Zagreb* II. Amruseva 5/1.
- NEDERLANDO:** Nederlanda Esperanto Centro, *Rotterdam* W. Huygensstraat 17. B.
- NORVEGIO:** Norvega Ligo Esperantista, Librofako, *OSLO*, Boks 942.
- POLUJO:** Isaj Dratwer, *Warszawa*, 11 Listopada 22. T. O. Z.
- PORTUGALIO:** Saldanha Carreira Jorge, *Benfco-Lisboa*, Grao Vasco 33, r/c.
- RUMANIO:** Societo Esperantista Rumana, *Bukuresti*, Casuta Postale 9.
- SVEDUJO:** Förlagsföreningen Esperanto, *Stockholm*, 19, Fack 19.071.
- USONO:** Esperanto Asocio de Nord-Amriko, *New York* 11, 114 West 16-th Street.

Kiuj deziras reprezenti la „Esperanto Filmo-Grupo“-n en sia lando, bonvolu sin anonci grandnombre el ĉiuj landoj. Antwerpse-straat 45. Bergen op Zoom (Nederlando).

Arthur Baur:

SVISA ANTOLOGIO

540 paĝoj, formato 22x15 cm.

★

Prezo: bind. 4.60, broŝ.
4.— USA dol.

★

Aldonu 10% sendkostojn.

★

Mendu ĉe Literatura Mondo au niaj
Reprezentantoj.

JULIO BAGHY:

La vagabondo kantas

Poemoj

Formato 17x11 cm 112 paĝoj Prezo 0.80 dolaroj

„Jen fasko da poemoj serĉantaj vojon
al via koro.“

Mendu ĉe Literatura Mondo au niaj
Reprezentantoj

JAM APERIS!

Sándor Petöfi

JOHANO LA BRAVA

Tradukis: K. Kalocsay

Popolfabelo en versoj,
naiva epopeeto.

D u a e l d o n o .

Formato 12×17 cm.
66 paĝoj, prezo 0.80
USA dolaro au egalvaloro
plus 10% sendkosto.

Eldonis Literatura Mondo Budapest

J E R O M E K. J E R O M E

TRI HOMOJ EN BOATO

El la angla: G. BADASH

Formato 19×13 cm. 256 paĝoj.
Prezo 1.40 broŝ. 1.90 bind. Aldonu
10% sendkoston.

Sprita kaj facila rakonto pri gaja
ekskurso. Tauga legaĵo por progre-
santoj.

Mendu ĉe Literatura Mondo au niaj
Reprezentantoj.

A l e k s i s K i v i

SEP FRATOJ

Eldonis Vilho Setälä Helsinki

Formato 17.5×12.5 cm. 360 paĝoj,
prezo 2.60 broŝ. 3.30 bind. plus 10%
sendkosto.

Mendu ĉe Literatura Mondo.

L A J O S K Ö K É N Y

Populara Lernolibro de Esperanto

Pure esperantlingva lerno-
libro por komencantoj kaj
legolibro por kursanoj dum
kaj post kursoj.

Formato 20×15 cm 65 paĝoj.
Prezo 0.50 dolaro plus 10%
sendkosto.

Eldonis Literatura Mondo
Budapest